



**Malbonan
apetiton**

**Slovenio:
demokratio en post-
demokratia socio**


**Francio: komuna agado,
komunaj valoroj**

MORTO De ARTiSTO

Anna Löwenstein

Juna komika aktoro, Prokulpio, estas nura sklavo, kiam li renkontas Neronon ĉe festo. La du junuloj baldaŭ amikiĝas pro sia komuna intereso pri teatro kaj la artoj. Kune ili esploras la noktan vivon kaj aliajn distraĵojn de Romo, ĝis Nerono, nur 16-jara, estas nomumita imperiestro. Kun lia subteno, Prokulpio iĝas la ĉefa organizanto de mirigaj spektakloj prezentataj al la roma publiko, inkluzive de la amasa ekzekutado de fanatika nova sekto, la kristanoj.

Kaj tamen, ne ĉiam facilas esti amiko de imperiestro...



Anna Löwenstein



MORTO De ARTiSTO

Serio Stafeto n-ro 33

Eldonjaro: 2008

Klasika bindita versio: formato 135 x 205 mm, pezo 714 g,
624 paĝoj, ISBN: 978-90-77066-39-3;
prezo ĉe FEL 20 EUR + afranko.

Kiel e-libro (ePub aŭ PDF): prezo ĉe FEL: 12 EUR.

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140,
B-2000 Antwerpen, Belgio.

Rete: www.retbutiko.net - retbutiko@fel.esperanto.be

Komuna agado, komunaj valoroj

14

Dum pluraj monatoj, multaj manifestacioj sinsekve arigis plurajn milionojn da homoj en kelkcentoj da urboj, kun subteno de pli ol 70 % de la francoj, malgraŭ gravaj ĝenoj. Por la unua fojo jam de tre longe, ĉiuj sindikatoj flankenmetis siajn interfratajn kverelojn por unuvoĉe alvoki la laboristaron defendi siajn emeritajn rajtojn.



Ruĝŝlima „vulkano”

20



London la 4an de oktobro, apud la urbo Ajka situanta 125 km sud-okcidente de Budapeŝto, rompiĝis angulo de baseno, kie oni deponis ruĝan ŝlimon, rezultantan el la produktado de aluminio. Inter 600 000 kaj 700 000 m³ da ruĝa koto kun pH inter 11 kaj 13 fluis laŭ la apuda rivereto, inundante proksimajn vilaĝojn. Thierry Salomon vizitis la vilaĝojn trafitaĵajn kaj sendis la raporton.

FOTO DE LA KOWRILO: SARA G

politiko

ENKETO	11
Flandrio vidas estontecon en (reformita) Belgio	
BELGIO	11
Senco sen sensacio	
DEMOKRATIO	12
Volo de la popolo	
MOLDAVIO	13
En la lando de la flavaj bicikloj	
FRANCIO	14
Komuna agado, komunaj valoroj	
NIĜERIO	15
Horor-minado	

moderna vivo

KIPRO	16
Ĉasantoj ĉasataj	
EVOLUHELPO	17
Simplaj solvoj por premaj problemoj	
FUMADO	17
Freŝa leĝo, freŝa aero	
FUNGOJ	18
Malbonan apetiton	
IRANO	18
Perfote kontraŭ perforto	
BESTOJ	19
Ŝafhundo senlima	
ALBANIO	19
Trezo dis„put”ita	
HUNGARIO	20
Ruĝŝlima „vulkano”	

medio

TOGOLANDO	22
Lernejoj en akvo	

spirita vivo

LA VOJO JAKOBA	24
Strato de la eŭropa kulturo	

enigmoj

Solve de “Kiom da?”	
(Monato 8-9/2010)	26
Solve de la proverba enigmo	
(Monato 8-9/2010)	26

› Abonoj	4
› Enkonduko	5
› Leteroj	6
› El mia vidpunkto	7
› Anoncetoj	27

politiko

HUNGARIO	8
Deliro dekstrula	
NIĜERIO	8
Prezidanto-vico	
NIĜERIO	9
Jubileo sen jubilado	
KOSOVO	9
Nova prezidanto	
DEMOKRATIA RESPUBLIKO KONGO	9
Kiel saĝulino konstruas ...	
BALKANIO	10
Libere moviĝi	
SLOVENIO	10
Demokratio	
en post-demokratia socio	

► Rekto al la eldonoj ...

- > Per via FEL-konto.
- > Per UEA-konto al la konto fela-x de Flandra Esperanto-Ligo.
- > El Belgio al konto 000-0265338-43 de Flandra Esperanto-Ligo, Antverpeno.
- > El Eŭrolando al IBAN-konto de Flandra Esperanto-Ligo, BE66 0000 2653 3843 (BIC-kodo BPOTBEB1), Postbank 1000 Brussel.
- > El Usono per ordinara usona ĉeko.
- > Per Visa aŭ Mastercard. Sendu la numeron, kontrolnumeron kaj validodaton fakse al +32 32 33 54 33, letere al Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen aŭ rete al retbutiko@fel.esperanto.be.
- > Per internacia poŝtmandato nome de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.
- > Per Paypal al konto financo@fel.esperanto.be.
- > Per bankĉeko tratita je belga banko en eŭroj. Aldonu 12 eŭrojn pro la bankkostoj.

Bv. noti, ke personaj ĉekoj ne plu estas akceptataj en Belgio.

► Tarifoj

Ŝtato de la paganto		MONATO			LA JARO aere	
		surface	aere	rete	3a klaso	1a klaso
Argentino	EUR	25	28	15	5,5	9
Aŭstralio	AUD	87	92	52,2	9,5	15
Aŭstrio	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Belgio	EUR	49	58	29,4	5,5	9
Brazilo	EUR	25	28	15	5,5	9
Britio	GBP	44	47	26,4	5	7
Bulgario	EUR	25	28	15	5,5	9
Ĉeĥio	EUR	39	42	23,4	5,5	9
Danio	DKK	366	396	219,6	41	67
Estonio	EUR	29	32	17,4	5,5	9
Finnlando	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Francio	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Germanio	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Grekio	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Hispanio	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Hungario	HUF	8100	8900	4860	1530	2500
Irlando	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Islando	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Israelo	EUR	43	46	25,8	5,5	9
Italio	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Japanio	JPY	7980	8500	4788	860	1200
Kanado	CAD	78	84	46,8	9	14
Kipro	EUR	39	42	23,4	5,5	9
Koreio	EUR	43	46	25,8	5,5	9
Kostariko	EUR	25	28	15	5,5	9
Kroatio	EUR	29	32	17,4	5,5	9
Latvio	EUR	29	32	17,4	5,5	9
Litovio	EUR	29	32	17,4	5,5	9
Luksemburgo	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Malto	EUR	39	42	23,4	5,5	9
Nederlando	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Norvegio	NOK	430	460	258	48	71
Nov-Zelando	NZD	105	111	63	11,5	18
Pollando	PLZ	115	126	69	23	36
Portugallio	EUR	43	46	25,8	5,5	9
Rusio	EUR	25	28	15	5,5	9
Serbio	EUR	25	28	15	5,5	9
Slovakio	EUR	29	32	17,4	5,5	9
Slovenio	EUR	39	42	23,4	5,5	9
Sud-Afriko	EUR	43	46	25,8	5,5	9
Svedio	SEK	499	543	299,4	56	85
Svislando	CHF	82	88	49,2	9	14
Usono	USD	78	82	46,8	8	13

► aŭ pere de peranto ...

- > **Aŭstralio:** Libroŝerbo de AEA, 4/23 Albue-
ra Street, Battery Point Tas 7004, Australia.
Reto: libroŝerbo@esperanto.org.au.
- > **Aŭstria:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38,
3400 Klosterneuburg. Pĉk. 7 127 744.
Reto: leopold.patek@esperanto.at.
- > **Belga:** Vlaamse Esperantobond, Frankrijklei
140, 2000 Antwerpen (pĉk. 000-0265338-43).
Reto: financo@fel.esperanto.be.
- > **Brazila:** Brazila Esperanto-Ligo,
Caixa Postal 3625, 70084-970 Brasilia.
Reto: bel@esperanto.org.br.
- > **Brita:** Viv O'Dunne, Esperanto-Asocio de
Britio, Esperanto House, Station Road, Bar-
lston, Stoke-on-Trent, ST12 9DE, Britio.
Reto: eab@esperanto-gb.org.
- > **Ĉeĥa:** Pavel Polnický, Kunštátská 1350/III.,
290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651. La konto
de ĈEA en Komerční banka: 3330 021/0100,
variab. symbol por gazeto Monato: 07001.
Reto: cea.polnický@quick.cz.
- > **Dana:** Revuŝerbo de DEA, Arne Casper,
Bryggervangen 70, 4. Tv., DK-2100 Køben-
havn Oe. Tel.: +45 39 20 63 48 Poŝtel.: +45
21 40 84 87. Reto: arne-casper@email.dk.
- > **Estona:** Virve Ernits, Vallimaa 17-8, EE-
93812 Kuressaare. Reto: virveernits@hotmail.ee.
- > **Finna:** Päivi Saarinen, Esperanto-Asocio de
Finnlando, Siltasaarekatu 15 C 65, FI-00530
Helsinki, Finnlando.
Reto: eafofficejo@esperanto.fi.
- > **Franca:** Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis,
rue de la Cerisaie, F-75004 Paris (pĉk.: 855-35 D
Paris). Reto: esperanto-france@esperanto.org.
- > **Germanaj:**
> Abo-Servo "ESPERO", Rolf Beau, Eißer
Kirchweg 18, DE-27333 Schwingen,
(Commerzbank Hoya, Kontonumero:
0 420 933 400, BGN: 290 400 90)
Reto: robo.espero@acn-mail.de.
- > Hans Dieter Platz, Postfach 1148, D-34303
Niedenstein (Postbank Ludwigshafen, pĉk
91856-676 (BLZ 54510067)).
Reto: HDP@internacia-festivalo.de.
- > Esperanto-Buchversand Dr. Wolfgang Schwan-
zer, Pfarrer-Seeger-Str. 9, D-55129 Mainz.
Reto: wolfgang.schwanzel@esperanto.de.
- > **Hispana:** Kataluna Esperanto-Asocio,
Apartat, 1008, E-08200 Sabadell (Caixa
d'Enginyers, 3025-0002-47-1433276794).
Reto: kea-kasisto@esperanto.cat.
- > **Hungara:** AbonaSoft Bt,
HU-1093 Budapest, Bakáts u. 1/3 III.1.
Reto: abonasoft@gmail.com.
- > **Irlanda:** Esperanto-Asocio de Irlando, 9
Templeogue Wood, Dublin 12.
Reto: noviresp@eircom.net.
- > **Islanda:** Islanda Esperanto-Federacio,
Pósthólf 1081, IS-101 Reykjavík.
Reto: esperant@ismennt.is.
- > **Itala:** Itala Esperanto-Federacio, Via
Villoresi 38, I-20143 Milano (pĉk.:
37312204). Reto: fesp.it@infinito.it.
- > **Japana:** Japana Esperanto-Instituto,
Wasedamati 12-3, Sinzyuku-ku, Tokio 162.
esperanto@jei.or.jp.
- > **Kanada:** Kanada Esperanto-Asocio, p/a
Yves Bellefeuille, kasisto, 2372 Haddington,
Ottawa, Ontario K1H 8J4. Reto: yan@storm.ca.
- > **Korea:** Seula Esperanto-Kulturcentro, 601
ho, Dongboog B/D 12-3, 2 ga Choongmu-ro

- Chung-ku Seulo, Koreio. 100-860
Reto: esperanto@saluton.net.
- > **Kostarika:** Hugo Mora, Apartado 4981,
1000 San José. Reto: miaumiau1@ice.co.cr
- > **Kroata:** Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti
Duh 130, HR-10000 Zagreb.
Reto: marija.belosevic@zg.t-com.hr
- > **Latva:** Margarita Zelve, str. Rupniecibas
35-13, Riga, LV-1045, Latvio. Tel.: +371
6407174. Reto: Margarita@rsu.lv.
- > **Litova:** Laimius Stražnickas, LEA, a.k.187,
LT-01003 Vilnius-C, Litovio.
Reto: laimiuslt@gmail.com.
- > **Luksemburga:** LEA, 1 rue de Kehlen, 8394
Olm (pĉk.: CCPLULL IBAN LU50 1111 0089
3612 0000). Reto: wickler.albert@gmx.net
- > **Nederlanda:** UEA, Nieuwe Binnenweg
176, NL-3015 BJ Rotterdam.
Reto: uea@inter.nl.net.
- > **Norvegia:** Eldonejo Esperanto A/S, Olaf
Schous vei 18, 0572 Oslo 5.
Reto: inform@esperanto.no.
- > **Nov-Zelanda:** David Dewar, 28 Coventry
Way, Long Bay, North Shore City 0630.
Reto: gddewar@ihug.co.nz
- > **Pola:** Danuta Leyk, ul. Miedzyborska 117
m 8, PL-04-013 Warszawa, konto 06-1020-
1156-0000-7102-0036-6328 ĉe PKO BP XIV
O/Wwa. Reto: dankal@epf.pl.
- > **Portugala:** Portugala Esperanto-Asocio,
R. Dr. Joao Couto 6, r/c A, P-1500-239
Lisboa. Reto: portugala@esperanto.web.pt.
- > **Ruslandaj:**
> Halina R. Gorecka, RUS-236039 Kalinin-
grad, ab. ja. 1248, Ruslando.
Reto: sezonoj@gazinter.net.
- > Mikaelo Ĉertilov, Pf. 21, RUS-143006
Odincovo 6, Ruslando. Tel.: 095-5934964.
Banko: "AVTOBANK-NIKOIL", konto N.:
42301.810.3.0018.0084867.
Reto: mikaelo@km.ru.
- > **Serba:** Zoran Ćirić, Branka Miljković
14, 18000 Niš, tel. +381-18-522 582, poŝtel.
+381-63-7200 616. Reto: zciric@eunet.rs.
- > **Slovaka:** Stano Marček, Zvolenská 15/11,
SK-3601 Martin. Reto: marcek@esperanto.sk.
- > **Slovenaj:**
> Višnja Branković, Via Parini 5, I-34129
Trieste. Reto: visnja.brankovic@os.htnet.hr.
- > Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti Duh 130,
HR-10000 Zagreb.
Reto: marija.belosevic@zg.t-com.hr
- > **Sud-Afrika:** Colin Beckford, 43 Fairview
Crescent, Milnerton Ridge, 7441.
Reto: beckford@telkomsa.net.
- > **Svedaj:**
> Esperanto-Skolan, Svenska Arbetar Espe-
ranto-Förbundet, Svartviksvägen 14, S-123
52 Farsta, p.ĝ. 5 31 60 - 8. Reto: persson.esperanto@telia.com.
- > Sveda Esperanto-Federacio, c/o Lisbet
Andreasson, Kajsa Kavats gata 8, SE-242 35
Hörby, Svedio.
Reto: bertil.andreasson@horby.mail.telia.com.
- > **Svisa:** Christoph Scheidegger, Im Schleidorn
6, CH-4224 Nenzlingen, ĝirkonto 40-52 612-7
Basel. Reto: ch_scheidegger@bluewin.ch.
- > **Usona:** ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito,
CA 94530. Tel.: +1 510 653 0998, Fakso: +1
510 653 1468. Reto: elna@esperanto-usa.org

ePub

Kiam antaŭ pli ol 30 jaroj Stefan Maul kaj Torben Kehlet, la fondintoj de Monato, projektis la revuon, ili pensis nur pri papera magazino, sendata perpoŝte al la abonantoj. Tio ja estas komprenebla. En tiu tempo Interreto en sia nuna formo tute ne ekzistis. Ĉio estis sendata tra la tradicia poŝto.

En 1993 Flandra Esperanto-Ligo, la eldonanto de Monato, aĉetis modemon kun la celo telefone sendi manuskriptojn inter redaktoroj kaj eldonejo. Sed antaŭ ol rekomendi al siaj redaktoroj aĉeti tian novan inventaĵon de la moderna teknologio, FEL ja deziris testi. Sed kun kiu? Nu, en la marta numero de 1993 legeblis la jena anonceto: „Ĉu vi havas modemon? FEL serĉas kelkajn personojn, kiuj havas modemon (kaj komputilon!) kaj pretas fari kelkajn mallongajn testojn.” La testpersonoj estis trovitaj, la testoj sukcesis, kaj Monato rekomendis al siaj re-

daktoroj instali tiun novan aparaton. La redaktoro, kiu faris tion tuj, estis Paul Gubbins, kaj liaj tekstoj estis do la unuaj esperantlingvaj manuskriptoj, kiuj fluis „tra la reto” antaŭ ol aperi.

La abonantoj havis kontakton kun la reta Monato nur tri jarojn poste, kiam la unuaj artikoloj estis konsultebaj sur la serviloj de CompuServe. Tamen, nur en 2001 la abonantoj povis decidi ricevi la tekstojn hejme, ĉiun artikolon aparte, kiel retmesaĝon. Denove tri jarojn poste Monato lanĉis sian revuon en la dosierformo PDF. Tiu formo enhavis fotojn kaj estis plenkolra, tre kontrasta do kun la ĝistiam pure teksta formo de la reta versio. Nun, preskaŭ 10 jarojn poste, pli-malpli 10 elcentoj de la abonantaro elektas la PDF-version.


La tekniko tamen plu evoluas, kaj komputiloj iĝas pli kompaktoj. Pro tio abonantoj lastatempe esprimis sian deziron legi Monaton ankaŭ en sia poŝtelefono aŭ en sia librolegilo, kaj

por tiaj malgrandaj ekranoj la PDF-formo ne tre taŭgas. Pro tio la eldonejo decidis proponi al siaj abonantoj plian formon, la dosierformon ePub, kiu aparte taŭgas por lertaj poŝtelefonoj kaj por elektronikaj librolegiloj.

Okaze de via reabono bonvolu do pripensi: aŭ vi daŭre abonas la tradician paperan version – kiu ja ĉiam ekzistos –, aŭ vi elektas unu el la retaj versioj (PDF, ePub aŭ pure teksta) kontraŭ nur 60 % de la baza tarifo. Tiuj, kiuj deziras, povas ricevi ambaŭ: paperan version kaj unu retan version. En tiu okazo la reta versio estas senpaga.

La stabo de Monato deziras al vi ĉiuj agrablan legojaron!

Sincere via



Paŭl Peeraerts



www.monato.net

MONATO, internacia magazino sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo en la internacia lingvo Esperanto; fondinto: Stefan Maul; 31a jarkolekto; aperas principe la 1an de ĉiu monato, escepte de aŭgusto; abontarifo varias laŭlande.

100 konstantaj kunlaborantoj kaj korespondantoj en 45 landoj; legantoj en 65 landoj; aperas nur originale en Esperanto verkitaĵoj (ne tradukaĵoj); represoj kaj tradukaĵoj el MONATO nur kun indiko de la fonto; kopi-rajto ĉe la eldonejo; ekzistas kaseda kaj komputila (MPD) versioj de MONATO por blinduloj, mendu ilin pagante 15,40 EUR al UEA, konto robm-b; la enhavo de la artikoloj ne nepre kongruas kun la opinio de l' eldonejo.

Verantw. uitgever: Paul Peeraerts, Frankrijklee 140, B-2000 Antwerpen.

eldonejo:

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklee 140, B-2000 Antwerpen, Belgio; telefono: +32 3 234 34 00, telekopiilo: +32 3 233 54 33, retpoŝto: eldonejo@monato.net, Skype-telefono: fel-monato; valida anoncitarifo: n-ro g; kompostita, presita kaj vinkita en la eldonejo.

ĉefredaktoro:

Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg.
Rete: chefredaktoro@monato.net.

reviziantoj:

Hèctor Alòs i Font, Edmund Grimley Evans, Katalin Kováts, Jens S. Larsen, Brian Moon, Anna kaj Mati Pentus, Alexander Schlafer.

redakcia sekretario:

Paul Peeraerts.
Rete: redakcio@monato.net.

grafiko:

Julia Litvinova.

redaktoroj:

• **Arto:** Claude Nourmont-Moon, 2 Om Kläppchen, L-5682 Dalheim, Luksemburgo. Rete: arto@monato.net.

• **Ekonomio:** Roland Rotsaert, Vispaanstr. 97, B-8000 Brugge, Belgio. Rete: ekonomio@monato.net.

• **Enigmoj:** Jean Pierre VandenDaele, Hisselsgasse 85, B-4700 Eupen, Belgio. Rete: enigmoj@monato.net.

• **Eseo:** Sendu al la koncerna redaktoro, depende de la temo.

• **Hobio:** Evgeni Georgiev, Porzellangasse 25/41, A-1090 Vieno, Aŭstrio.

Rete: hobio@monato.net.

• **Komputado:** Edmund Grimley Evans, 2 Comfrey Court, Cambridge, Britio CB1 9YJ.
Rete: komputado@monato.net.

• **Leteroj:** MONATO, Frankrijklee 140, 2000 Antwerpen, Belgio.
Rete: leteroj@monato.net.

• **Libroj:** Boris Kolker, 6755 Mayfield Rd, Apt 312, Cleveland, OH 44124, Usono.
Telefono 440-646-1482.
Rete: libroj@monato.net.

Noto: Librocenzon oni ne sendu al la redaktoro proprajinitate. La kunlaborantoj ricevos la librojn kaj la recenzopetojn de la eldonejo.

• **Lingvo:** Yamasaki Seikō, Higasi Koigakubo 3-18-12 Kokubunzi-si, 185-0014 Tokio, Japanio.
Rete: lingvo@monato.net.

• **Medio:** Slezák Tamás, Damjanich u.12, HU-9200 Mosonmagyaróvár, Hungario.
Rete: medio@monato.net.

• **Moderna vivo:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio.
Rete: moderna_vivo@monato.net.

• **Noveloj kaj Poezio:** sendu

viajn kontribuojn al la eldonejo: Monato, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklee 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.
Rete: noveloj@monato.net.

• **Politiko:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio.
Rete: politiko@monato.net.

• **Scienca:** Thomas M. Eccardt, 455 E 14th St. #3C, New York, N.Y. 10009, Usono.
Rete: scienca@monato.net.

• **Spirita vivo:** Gerrit Berveling, Kalverstraat 8 B, NL-8011 LH Zwolle, Nederlando.
Rete: spirita_vivo@monato.net

• **Sporto:** provizore sendu viajn kontribuojn al la eldonejo: Monato, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklee 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.
Rete: sporto@monato.net.

• **Serco kaj satiro:** Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg, Germanio. Rete: sherco_kaj_satiro@monato.net.

• **Turismo:** Evgeni Georgiev, Porzellangasse 25/41, A-1090 Vieno, Aŭstrio.
Rete: turismo@monato.net.

Parado de toleremo (2)

Responde al la letero de Atanasije Marjanović (*Parado de toleremo*, MONATO 2010/10, p. 6) mi ŝatus emfazi, ke aliseksemaj personoj elmontras sian seksemon ĉiutage, multnombre surstrate – prenante sin je la manoj, interkisante, brakumante. Kial do samseksemaj personoj ne rajtas tion, eĉ unu tagon jare? Mi malkonsentas, ke paradoj de toleremo estas paradoj de maltrankviligo – maltrankviliĝas nur agresemaj kontraŭuloj, dum gejoj kaj iliaj amikoj iras gaje kaj amikeme. Mi estas ĉagrenita, ke ekzistas esperantisto, kiu malferme kaj senhonte subtenas agresantojn.

Paweł FISCHER-KOTOWSKI
Pollando

Parado de toleremo (3)

Atanasije Marjanović diras (MONATO 2010/10, p. 6), ke „paradoj de toleremo” estas „paradoj de maltrankviligo”, sed kial? Kio maltrankviliga estas en tio, ke homoj volas egalajn rajtojn anstataŭ diskriminacio? Malgajigas

min, kiam mi legas tiajn skribaĵojn de esperantistoj, kiuj fieras pri supozeble pli da toleremo, komprenemo, progreso, amikemo ktp.

Atanasije probable ne plendas, kiam viro kaj virino havas geedziĝan procesion sur strato, ekzemple, do la argumento, ke „seksemo ne estas por stratoj”, ŝajnas esti nur preteksto. Ĉiutage aliseksemuloj montras sian seksemon publike – per vira mencio pri „mia koramikino” aŭ ina mencio de „mia edzo”, per geedzaj ringoj, per portretoj de la amato en laborejo aŭ monujo, per kuntenado de manoj dum promeno, per kiso kaj diro „mi amas vin”. Kial la samaj amaj agoj de samseksaj paroj devas maltrankviligi?

En Serbio ĵus manifestaciis 8000 beogradanoj kontraŭ gejoj per naziaj salutoj kaj kriadado „mortigu la gejojn”. Vundiĝis 150 homoj pro perfortaj atakoj. Ne publika samseksemo, sed publika kontraŭgejemo estas la vere maltrankviliga (kaj danĝera) afero.

Russ WILLIAMS
Pollando

Ne tiel eksterordinara

Leginte en la aŭgusta-septembra numero, paĝo 23, artikolon pri trovita piedsigno de dinosaŭro, mi ne certas, ĉu mi bone komprenas la frazon „... la fosiliaĵo estas tute eksterordinara”. La pasintan februaron mi vizitis la hispanan regionon La Rioja kaj mem tuŝis kelkajn el pluraj centoj da tiaj piedsignoj de dinosaŭroj de diversaj specioj, perfekte videblaj en la roka surfaco. Pli da informoj pri tiu allogaĵo troveblas (ankaŭ en la germana lingvo) en www.lariojaturismo.com/dinosaurios/index.php.

Manolo PARRA
Hispanio

La lulilo de astronomio

La artikolo pri Mirzo Ulugbeg (MONATO 2010/7, p. 14-18) estas tre interesa kaj instrua, sed mi deziras doni unu malgrandan klarigon. La Internacia Jaro de Astronomio estis proklamita de Unesko, ĉar antaŭ 400 jaroj Galileo Galilei inventis la teleskopon. Nature estas, ke ni apud Galilejo menciu la beogradan scienciston Milutin Milanković. En la tria ĉapitro de sia libro *Vojaĝanto tra la universo kaj jarcentoj*, kiu nomiĝas *Lulilo de astronomio*, li en fantazio vojaĝas al Babilono kaj surgrimpas ĝian turon, ĉar tie estis la lulilo de astronomio, antaŭ pli ol du mil jaroj.

Atanasije MARJANOVIĆ
Serbio



Donackupono

Donaco por via korespondamiko?

Donaco por la amikoj de Pasporta Servo kiuj tiel afable gastigis vin?

Donaco por merita ano de Esperanto-klubo?

Jen ideala estas la **Donackupono** de MONATO! Facile kaj malmultekoste sendebla per poŝto aŭ transdonebla en luksa koverto. Donaco ĉiam utila por ne-abonantoj kaj por jamabonantoj.

Ekzistas tri versioj:

- 1) La kupono de **12,25 eŭroj**, kiu rajtigas al la ricevinto **3-monatan** abonon al la magazina versio de Monato, aŭ **5-monatan** abonon al la reta.
- 2) La kupono de **24,50 eŭroj**, kiu rajtigas al la ricevinto **6-monatan** abonon al la magazina versio de Monato, aŭ **10-monatan** abonon al la reta.
- 3) La kupono de **49 eŭroj** kiu rajtigas al la ricevinto **12-monatan** abonon al la magazina versio de Monato, aŭ **20-monatan** abonon al la reta.

Mendu vian MONATO-donackuponon nun ĉe Monato, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio aŭ rete ĉe monato@fel.esperanto.be.

La rubriko „Leteroj” estas malferma por koncizaj (maksimume 150-vortaj) reagoj de legantoj pri aktualaj artikoloj aperintaj en Monato. La redakcio faras propran elekton, post lingva kaj stila polurado. Letero, ankaŭ reta, estu subskribita per la nomo, kompleta stratadreso kaj telefonnumero. Per la sendo de la letero la aŭtoro donas sian permeson publikigi ĝin en la papera kaj en la reta versioj de Monato.

Leteroj por publikigo estu senditaj al leteroj@monato.net aŭ al Monato, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

Du mil dek

2010

Stefan MAUL

La plej kuriozan kaj ridindan mensogon ĉi-jare ni aŭdis sendube el Ĉinio. Kiam oni informis, ke Nobel-premion pri paco ricevos la ĉina disidento Liu Ŝiaobo, ĉina ministro diris: „En Ĉinio ne ekzistas disidentoj, nur krimuloj.” (Ĉu tio signifas, ke ĉiuj ĉinoj estas krimuloj?) Kaj la estrino de la ĉina PEN-klubo (PEN, kiel konate, estas klubo de aŭtoroj) asertis, ke aŭtoro kun tiu ĉi nomo ne ekzistas. Ĉu do la stulta norvega Nobel-komitato elektis fantomon?

Pli simplan, tamen ankaŭ ridindan mensogon ni aŭdis dum la vintro de germanaj urbestroj. Pro forta neĝado baldaŭ mankis stratosalo en multaj urboj – almenaŭ tion asertis la aŭtoritatoj. Fakte estis, ke unu tuno da salo en aŭtuno 2009 kostis 70 eŭrojn, en februaro 350 eŭrojn (ĉar pro granda postulado la merkato reagis, kaj la salproduktantoj draste altigis la prezon). La urboj simple ne volis pagi tiom multe ...

Diversaj saŭnoj

La kaprica vetero regalis germanojn ne nur per malvarmega vintro sed ankaŭ per varmega somero. Kiu kutimis dormi nude, estis kompatinda homo, ĉar li ne plu havis ion por malvesti sin, nur la propran haŭton. Tamen unu nuda grupo tute ne suferis pro la varmego: saŭnistoj. Ili frekventis la trohejtitan ejojn ankaŭ dum trohejtita somero. Prudente la germana fervojo proponis al siaj pasaĝeroj (kiujn nun oni nomas „klientoj”) saman servon: en la klimatizitaj vagonoj de fifamaj eksprestaraĵoj ICE okaze estis tiom varmege, ke pluraj homoj kolapsis pro la temperaturo de 50 gradoj celsiaj. La klarigo estis simpla: kolapsis ankaŭ la klimatiziloj en la trajnoj, ĉar ili kapblas malvarmigi maksimume ĝis la temperaturo de 30 gradoj. Kiam antaŭ

Kiu kutimis dormi nude, estis kompatinda homo, ĉar li ne plu havis ion por malvesti sin, nur la propran haŭton.

multaj jaroj oni instalas ilin, neniu povis imagi, ke pro klimatsanĝo ankaŭ en Germanio fojfoje estos temperaturoj pli altaj ...

Kiel konate, la saŭnonacio estas Finnlando. Tie oni asertas, ke saŭnado estas tre saniga. Probable sen saŭnoj finnoj mortus multe pli frue. Nun tamen mortis homo *pro* saŭnado. En Finnlando oni volis eltrovi la mondĉampionon de tiu saniga proceduro. Sed ĉi-jare rusa finalisto mortis, kuirita ĉe 110 gradoj.

Sekurec-manio

Nudeco ĉiel ajn estas granda modo. Tial oni nun instalas en ĉiuj grandaj flughavenoj tiel nomatajn nud-skaniilojn, do aparatojn, kiuj sur ekrano montras korpojn sen vestoj; tiel oni volas trovi kaŝitajn tranĉilojn kaj aliajn danĝerajn instrumentojn, kiujn volonte uzas teroristoj. Tiel do islamistaj fanatikuloj sukcesis nudigi okcidentanojn. Ĉu iu jam elkalkulis, kiom kostas tiu tuta sekurec-manio, kiu rabas la dignojn de miliardoj da homoj, nur por savi eventuale unu, du vivojn?

Oni emas mutiĝi pro tiom da histerio. Mutaj nun devas esti radiostacioj en Somalio, ĉar tieaj islamistoj asertas, ke muziko estas peko. Kaj ĉar islamistoj volonte punas pekulojn per mortigo, la radiostacioj obeas al la malpermeso. Kiel konate, oni ne rajtas ankaŭ ŝerci pri Islamo. En aliaj religioj tio ne estas problemo. Jen ŝerco, kiun volonte rakontas katolikaj pastroj mem: Pastro vokis gepatrojn por plendi pri ilia filo. „Li lernas kaj atentis nenion.

Laste li eĉ ne sciis ion ajn pri la morto de Jesuo.” La patro cerbumas kaj poste konfesas: „Vi devas pardoni, sed ni eĉ ne sciis, ke Jesuo estis malsana.”

Brazilo onidire estas katolika lando, sed ankaŭ tie – almenaŭ dum difinita tempo – estis malpermesite ŝerci, nome pri politikistoj dum la elektokampanjo. Kiu televido primokis kandidaton, riskis monpunon ĝis 80 000 eŭroj. Nu, tie oni almenaŭ ne riskis mortpunon ...

Mortoj kaj tankoj

Por mortintoj ja ekzistas diversaj kultoj en diversaj kulturoj. En Usono precipe katolikaj italaj enmigrintoj konservis la tradicion, eksponi mortintojn en nefermita ĉerko, kion oni nomas „public viewing” (publika rigardado). En Germanio dum la mondĉampionado de futbalo en grandaj urboj sur placoj oni proponis ankaŭ tiun „public viewing”, sed anstataŭ kadavrojn oni montris sur grandaj ekranoj futbalmatĉojn. Oni en tiu lando reklamas ankaŭ sakojn kun la nomo „Body-Bag”, angla vorto por kadavrosako. German-usona lingvo evidente emas ŝanĝi vortsignifojn.

Ni restu ĉe morto: tankoj, kiel konate, servas por mortigi malamikojn. Sed la rusa armeo nun instalas ĉe kelkaj landlimoj balon-tankojn, do postičojn kun aero interne. Per tia blufu rusoj volas fortimigi malamikojn. Mi proponas, ke ĉiuj armeoj tutmonde imitu la rusan modelon; tiel nia mondo estos multe pli paca. Do ni ne ridu pri la rusa armeo! ■

HUNGARIO

Deliro dekstrula

En aŭtuno okazis en Hungario tutlandaj municipaj balotoj. En pli ol 3200 municipoj oni elektis urbestrojn kaj estrarojn. En 400 lokoj prezentis sin nur unusola kandidato kiel urb- aŭ vilaĝ-estro. Tie sufiĉis nur unu valida voĉo.

La kampanjo estis mallaŭta kaj enuiga, ĉar la partioj kvazaŭ akceptis la rezultojn de la printempaj parlamentaj balotoj. Okazis nenio nova: furoris la dekstruloj, kiuj preskaŭ ĉie venkis.

Tiel, post 20-jara liberaldemokrata erao, ankaŭ Budapeŝto apartenas al la dekstruloj. Nur la suda urbo Szeged [seged] apartenas al la socialistoj, sed tie la urbeŝtraro havas dekstran plimulton. En vilaĝoj, kie oni voĉdonas pli por personoj ol partioj, ofte venkis sendependuloj.



Viktor Orbán

Bloko

La nuna venko spegulas la socialisman epokon, kiam ĉie venkis la „Patriota Popolfronto”. Nun tamen dekstra bloko regas kaj la parlamenton (kun rajto modifi eĉ la konstitucion) kaj la municipojn.

Tiel kreskis la respondeco de la ministrestro Viktor Orbán. Lia mandato daŭros preskaŭ kvar jarojn, dum kiuj li devas krei stabilan ekonomion spite internacian krizon.

Karlo JUHÁSZ

NIĜERIO

Prezidanto-vico

En januaro 2011 niĝerianoj elektos novan prezidanton. La nuna prezidanto, Goodluck Jonathan [gudlak ĝxonatan], la iama vicprezidanto, transprenis la povon en majo 2010 post la morto de la antaŭa ŝtatestro, Umaru Musa Yar'Adua.

Jonathan fariĝis la unua prezidanto el la niĝeria minoritato. Niĝerio havas pli ol 450 etnojn, sed la tri ĉefaj etnoj, aŭ gentoj, Igbo, Haŭsa kaj Joruba, bataladas por regi la landon. Dum la armea regado la generaloj, kiuj fariĝis ŝtatestroj, devenis de la norda, islama, haŭsa parto de Niĝerio. En 1999 ĉio ŝanĝiĝis, kiam prezidantiĝis eksa generalo Olusegun Obasanyo el la okcidenta, joruba parto de Niĝerio.

Nafto-riĉa

La nuna prezidanto, kiu devenas de

la nafto-riĉa suda Niĝerio, jam anoncis sian kandidatiĝon. Kontraŭas lin kandidatoj el la nordo, kiuj opinias, ke venis la vico de norda prezidanto. La suduloj replikas, ke Yar'Adua, nordulo, mortis post tri jaroj da prezidanteco kaj do restu ĉe ili la prezidanta posteno. Subtenas la kandidatecon de Jonathan – cetera niĝerianoj taksas lin bonŝanca pro lia persona nomo, Goodluck, kiu signifas „bonŝanco” – minoritataj ŝtatoj kaj el sudo kaj el nordo. Apogas lin jam 40 politikaj partioj el la nunaj 63 en Niĝerio.

Kandidatecon anoncis aliaj homoj, i.a. la armea prezidanto Babangida, mem ŝtatestro inter 1985 kaj 1993. Tiu okazis preskaŭ internan militon en Niĝerio, kiam li renversis la popularan venkon de prezidanto Abiola. Dum la protestoj mortis miloj da niĝerianoj.

Princo Henriko OGUINYE/pg



Goodluck Jonathan, la iama vicprezidanto, transprenis la povon de Umaru Musa Yar'Adua.

Jubileo sen jubilado

Komence de oktobro milionoj da niĝerianoj festis la oran jubileon de sendependiĝo el Britio en la jaro 1960. La registaro elspezis milionojn da dolaroj, sed opoziciaj partioj taksis la elspezon sensenca en lando, kie 70 % de la loĝantaro mortos en malriĉo.

Malgraŭ kritikoj, la 1a de oktobro estas deklarita nacia tago. La festoj daŭris kelkajn tagojn kaj al Niĝerio venis pli ol 20 ŝtatestroj kaj multaj reprezentantoj de aliaj landoj. La ceremonio okazis ĉefe en la iama ĉefurbo, Lagos, kaj en la nuna, Abuĝo. La niĝeria armeo okazigis grandan spektaklon, kun la celo montri la pretecon de la lando fariĝi mondopotenco en la venontaj 50 jaroj.

Sekureco

Tamen en la centro de Abuĝo, kie

okazis la ceremonio, kaj malgraŭ sekureco, kelkajn metrojn for de la niĝeria prezidanto kaj liaj gastoj, eksplodis bomboj. Mortis 12 homoj, ĉefe agentoj de la sekurecaj servoj, kaj estas vunditaj multaj aliaj.

Kulpigitaj estas niĝerdeltaj militantoj kaj ties ĉeforganizaĵo Movado por la Liberigo de Niĝerdelt (MEND). La grupo neis respondecon. Du tagojn poste estas arestitaj dekoj da homoj, inkluzive de la estro de sendependa radio- kaj televido-stacio, kiu organizis kampanjon favore al la eksa prezidanto Ibrahim Babangida.

Nun regas en Niĝerio konfuzo, ĉu Babangida, kiu volas fariĝi denove prezidanto, enplektiĝis en la atenco. Certe estas, tamen, ke la eksplodoj makulis la jubileon, tiel ke pli lamentis ol celebris niĝerianoj.

Princo Henriko OGUINYE/pg



Ĉu Babangida, kiu volas fariĝi denove prezidanto, enplektiĝis en la atenco?

Nova prezidanto

Eksiĝis la prezidanto de Kosovo Fatmir Sejdiu pro tio, ke – kontraŭkonstitucie – li estis ne nur prezidanto, sed ankaŭ la estro de sia partio *Ligo Demokratia de Kosovo* (LDK).

Reveninte el Unuiĝintaj Nacioj, kiam Serbio rekonis suverenecon de la nova ŝtato Kosovo, Sejdiu diris, ke li respektos la konstitucion kaj ekxiĝos kiel prezidanto. Iuj opinias, ke la prezidinto povos tiel koncentriĝi pri sia partio antaŭ venontjaraj naciaj balotoj.

La parlamenta ĉefo Jakup Krasniqi, el la Partio Demokratia de Kosovo (PDK), fariĝos prezidanto, ĝis la parlamento elektos posteulon. Aktuale regas koalicio LDK kaj PDK.

Bardhyl SELIMI/pg

DEMOKRATIA RESPUBLIKO KONGO

Kiel saĝulino konstruas ...

En Demokratia Respubliko Kongo ekzistas 11 provincoj. La registaro volas distranĉi la landon por krei entute 26 provincojn aŭ federaciajn ŝtatojn. La senato jam aprobis la proponon.

Dubindas, ĉu la ŝanĝoj helpas la kongan popolon. En vasta lando tia regas aliaj prioritatoj, ekzemple kreado de pli bonaj vivkondiĉoj, kiaj ekzemple elektro, akvo, vojoj. Jam suferas multaj partoj de DRK pro mankoj tiaj, kaj krei novajn provincojn ne helpas.

Eble male. Povas esti, ke profitos tiuj provincoj, kiuj jam disponas pri pli bonaj vivkondiĉoj, dum aliaj restos en misero. Saĝa virino konstruas sian hejmon, tiel ke ĝi ne estu endanĝerigata. La nunaj proponoj povus konduki al malpaco aŭ eĉ milito. Konsilindas atendi.

Nelly MASEMI/pg

BALKANIO

Libere moviĝi

Antaŭ nelonge la Eŭropa Parlamento voĉdonis favore al libera moviĝo en EU ankaŭ por civitanoj de Albanio kaj Bosnio. La evento eĥigis entuziasme ĉe la albanoj, probable la plej izolita popolo en Eŭropo almenaŭ post la dua mondmilito.

Kulpis unue la komunisma tiel nomata fera kurteno kaj poste tiu de Eŭropo mem, kiu malhelpis al albanoj moviĝi tra kontinento, al kiu ili apartenas ekde pratempo.

Post 1990 ĉirkaŭ 30 % de la albana loĝantaro (1,5 milionoj da homoj) elmigris plejparte senvize. Nun familianoj, restantaj en Albanio, senpacience esperas ilin revidi. Kelkaj albanoj tamen opinias, ke libera moviĝo kondukos al amasa forfuĝo de albanoj. Verŝajne tio ne okazos.

Aŭtobusoj

En aliaj balkanaj landoj, pro la rajto libere moviĝi, multaj veturis okcidenten. Ekzemple antaŭ unu jaro en Sofio, Bulgario, staris dekoj da aŭtobusoj en la urbocentro pretaj ekveturi al okcidentaj eŭropaj landoj. Nun ne plu: mankas mono por vojaĝi.

Restas ankoraŭ unu lando en Balkanio, kies civitanoj ne rajtas libere moviĝi: Kosovo. Iam ankaŭ kosovanoj veturis senĝene tra la iama Jugoslavio. Pro tio multaj gejunuloj petas serban pasporton ĉe oficejoj tiucele malfermitaj en serbaj komunumoj.

Bardhyl SELIMI

SLOVENIO

Demokratio en post-demokratia socio



KOPIRAITO: ZORAN JANKOVIĆ

Zoran Janković

En Slovenio okazis en oktobro lokaj balotoj por urbaj kaj komunumaj asembleoj kaj por urbestroj. La partopreno estis magra – iom sub 50 % de la rajtigitoj.

En la du plej grandaj urboj Ljubljano kaj Maribor venkis la ĝisnunaj urbestroj Zoran Janković kaj Franc Kangler, ambaŭ subtenataj ne de partioj sed de propraj eksterpartiaj listoj. En Ljubljano la eksterpartia listo de Janković gajnis 47 % de la voĉoj kaj li povos facile regi praktike sola kun plimulto en la asembleo.

Aliflanke en Maribor la dekstrisma listo de Kangler gajnis nur 10 el 45 asembleanoj kaj verŝajne ne sukcesos krei koalicion, ĉar la maldekstraj partioj havas plimulton. Do al Kangler pli malfacilas regi ol ĝis nun. Tio aparte gravas, ĉar Maribor estos en 2012 kultururbo de Eŭropo. Tiam oni unuece kaj senkverele eluzu la ŝancon por levi la urbon al pli alta nivelo.

Oligarĥioj

Argumenteblas, ke la balotoj pruvigis la tezon de la brita sociologo Colin Crouch [kolen kraŭĉ], ke la nuna okcidenta politika sistemo estas ne plu demokratio, sed postdemokratio. Laŭ Crouch, ne plu venkas kvalitaj politikaj ideoj aŭ kontraŭulo de tiu, kiu malbone regis, sed tiu kun multe da mono, kiun subtenas financaj oligarĥioj.

Tio montriĝis en Maribor. La ĝisnuna urbestro uzis sian potencon por personaj interesoj kaj tiuj de siaj proksimuloj. La urba buĝeto suferis pro grava deficito kaj la urbestro plurfoje agis kontraŭleĝe. Ekzemple, li prezentis la urban bilancon por la pasinta jaro nur en aŭtuno, anstataŭ laŭleĝe en printempo. Tial ne eblis scii, kia minuso estas en la kaso kaj kiel la mono estas uzita.

Propagando

Tamen li estas reelektita de pli ol 50 % de la balotantoj jam en la unua voĉdonado. Dum la kampanjo li uzis enorman sumon, prenitajn verŝajne el urbaj fontoj por sin reklami. Krome li sendis personajn leterojn al balotantoj, proponante transporton al la balotejo kontraŭ voĉdono favora al li. Tion sciis mariboranoj, sed ili subtenis lin sub influo de forta kampanja propagando, pagita de ili mem.

Demokratio tia ne estas justa maniero regi kaj korekti malbonajn procedurojn. Estu flanke notite, ke la Verda Partio de Maribor gajnis du lokojn en la urba asembleo: inter la elektitoj estas Melita Cimerman, prezidantino de la urba Esperanto-societo.

Zlatko TIŠLIJAR

Flandrio vidas estontecon en (reformita) Belgio

Ne nur la ekonomikistoj (vidu ĉi-suban artikolon) kredas, ke Belgio ne baldaŭ disfalos. Ankaŭ la ĝenerala publiko preferas konservi Belgion, sed kun multe pli da povoj por la regionoj.

Demandite pri la estonteco, nur 18 % de la flandroj opinias, ke Belgio prefere ĉesu ekzisti. Preskaŭ same multe da flandroj, 16 %, estas poruloj de iu reiro al la unueca Belgio kun unu tutlanda parlamento kaj unu tutlanda registaro.


La fino de la lando laŭ la plej lasta enketo de *De Standaard* (unu el la plej prestiĝaj gazetoj) kaj VRT (la flandraj

radio kaj televido) do ankoraŭ ne estas antaŭvidita morgaŭ. Plimulto plu preferas la federacian ŝtaton, kvankam kun pli da povoj por la regionoj.

Konstantaĵo

Ke la plimulto de la flandroj preferas ne proklami la sendependecon, estas konstantaĵo en la esploroj, kiuj enketas pri la estonteco de Belgio. La rezulto de tiu ĉi enketo do ne mirigas, kvankam la kvanto de sendependiĝemuloj estas duoble pli alta ol antaŭ tri jaroj. Efektive, en 2007, baldaŭ post la federaciaj elektoj, 9 % de la flandroj estis poruloj de sendependa ŝtato.

Kiel vi vidas la estontecon de Flandrio?



1. ne scias (8%)
2. unueca Belgio (16%)
3. federacia ŝtato kun pli da povo por la federacio (5%)
4. federacia ŝtato kun pli da povo por la regionoj (36%)
5. konservo de la nuna federacia ŝtato (17%)
6. sendependa Flandrio (18%)

La treniĝanta politika senelirejo igis la sendependiĝemon klare pli populara, sed la plimulto de la flandroj preferas ne malfondi la landon.

Frape estas ankaŭ, ke la mezuma voĉdoninto por la partio *Nieuw-Vlaamse Alliantie* (N-VA) vidas sian estontecon prefere en Belgio ol en Flandrio, kondiĉe ke oni ekigu fundan ŝtatreformon. Nur unu el kvin voĉdonintoj por N-VA postulas la finon de Belgio. Tiu rezulto estas stranga, ĉar N-VA, la plej granda partio de Flandrio, en sia programo strebas al sendependiĝo de Flandrio disde Belgio.

pp

BELGIO

Senco sen sensacio

Balotoj en junio en Belgio montris dividon inter la nordo (flandra) kaj la sudo (valona). La partio N-VA, dekstra, tamen strebanta al fundamentaj ŝanĝoj, fariĝis la plej granda partio en Flandrio, dum la partio PS, maldekstra, tamen hezitema akcepti strukturreformojn, akiris plej multe da voĉoj en la suda Valonio.

Sed post pli ol cent tagoj da intertraktadoj cele al nova registaro kun sep partioj, kaj post jam du krizoj, N-VA fine anoncis, ke ĝi ne plu volas daŭrigi la nunajn traktadojn kaj preferas rekomenci ĉion de nulo.

Komunikiloj preferas sensaciajn novaĵojn. Tial eksterlandanoj povas ekhavi la impreson, ke la belga ŝtato baldaŭ disfalos. Por tion relativigi menciindas radiointervjuo la 5an de oktobro kun Karel Van Eetvelt de la entreprenista asocio „Unizo”. Laŭ la intervjuato „ni ne troigu la efikon de la belga politika krizo al ĝia ekonomio. Entreprenejoj ne atendas registarajn interkonsentojn. Ili simple daŭre funkcias. Krome multaj entreprenejoj organiziĝas internaciskale. Do la krizo apenaŭ influas.”

Li atentigis, ke necesos fundamentaj reformoj, ĉar en Belgio oni prokrastis

solvi la problemon pri maljuniĝanta popolo. Belgio, li diris, postrestas ĉi-rilate en Eŭropa Unio.

Krizetoj

„Jam antaŭ unu monato kaj duono,” li daŭrigis, „mi antaŭdiris, ke necesos diversaj krizetoj. Nun okazis la tria, sed laŭ mi nur temas pri krizeto, necesa, kiam la intertraktadoj stagnas. Tamen ekzistas bona volo en ambaŭ landopartoj kaj sendube la interkonsiliĝoj rekomenciĝos kun la samaj partioj. Ne ekzistas alia vojo.”

Li konkludis: „Estus granda eraro, se nun oni akceptus interkonsenton, nur por saviĝi el kriza situacio, sed kiu poste montriĝas neefika. Nur tiam la belga ekonomio riskas paraliziĝi.”

Ivo DURWAELE

Volo de la popolo

Fojfoje, malgraŭ demokratio, la volo de la popolo ne speguliĝas en la decidoj de registaroj kaj aliaj instancoj elektitaj. Jen du tiaj ekzemploj el Germanio.

En la urbŝtato Hamburgo, en norda Germanio, regas konservativaj kristandemokratoj (CDU) koalicie kun verduloj. Verda senatanino (tio estas, ministrino) pri edukado proponis reformon por daŭrigi dum ses jaroj komunan instruadon, antaŭ ol apartigi la infanojn laŭ kapabloj kaj laŭ estontaj lernejoj. Nuntempe la infanoj estas pli frue apartigitaj.

Kvankam konservativuloj kutime ne volas ŝanĝi lernejan sistemon, demokratia alianco, konsistanta ne nur el politikaj partioj sed ankaŭ el eklezioj kaj sindikatoj, subtenis la reformon. Tamen protestis burĝaj civitanoj, kies voĉoj pli fortis ol la parlamenta demokratio.

Advokatoj

Referendumo en julio 2010 sukcese postulis fini komunan lernadon post kvar jaroj en elementa lernejo. Do la parla-

mentan decidon plilongigi komunan lernadon nuligis 56 % de la civitanoj, kiuj partoprenis la referendumon. Tamen la rezulto trompas: la 56 % reprezentas nur 21 % de la voĉdon-raĵtigitoj, ĉefe loĝantoj de riĉaj kvartaloj, arkitektoj, advokatoj, kuracistoj kaj bankistoj.

Ĉi tiun aliancon de konservativa etburĝaro instigis la timo, ke gimnazioj – por la plej intelektule kapablaj infanoj – povus pro ŝpar-politiko perdi pliajn du jarojn. Tiel la supera burĝa tavolo, kun multjara sperto pri memmobilizado, kaj ignorante esplorojn, kiuj indikas, ke pli longa komuna instruado pozitive efikas sur ĉiujn lernantojn, sukcese renversis la celojn de elektitaj reprezentantoj de la popolo.

Trajnoj

Simile en la sud-germana urbo Stutgarto. Tie oni batalas kontraŭ nova sub-

tera stacidomo. En 1988 estis rekomendite rekonstrui la tiaman sakstacidomon por krei trairstacidomon. Tiel trajnoj povus ŝpari malmultajn minutojn inter Parizo kaj Munkeno.

Fine, en aŭgusto 2010, komenciĝis la laboroj. Necesos 57 km da novaj reloj, 16 km da tuneloj kaj 18 pontoj. La konstruado daŭros ĝis 2019 kaj kostos 4,1 miliardojn da eŭroj (spertuloj taksas la finan sumon pli alta).

Jam estas detruita parto de la malnova stacidomo kaj forigitaj pluraj arboj en urba parko. Tuj leviĝis protestoj. Kontraŭuloj ĉiutage manifestacias kontraŭ la projekto kaj komence de oktobro ilin atakis la polico. Vundiĝis centoj da homoj, inkluzive de infanoj. La polico diris, ke la perforto „originas ĉe la popolo”.

Parlamentanoj

Laŭ t.n. balotbarometro, pli ol 30 % de la popolo elektus la Verdan Partion kaj la kristandemokratoj, kiuj jam de 57 jaroj regas en Baden-Vurtembergo, perdus sian kutiman plimulton. En la pasinteco ricevi subtenon por projekto facilis, ĉar ofte parlamentanoj simple kapjesas, sekvante partiajn gvidistojn.

Nun en Stutgarto multaj civitanoj postulas la eksigon de la regiona registaro kaj de la urbestro. Aliflanke, multaj esperas, ke nova stacidomo plibonigos la fervojon kaj sekve la regionan ekonomion. Nun eksministro 80-jaraĝa provas trovi interkonsenton inter la du kontraŭaj grupoj.

Demokratio estas civitana rajto. Tiel regas plimulto super multenombra pseŭdominoritato. Du trionoj de du trionoj estas malpli ol duono: laŭ la reguloj de demokratio tio tamen estas plimulto. Tiamaniere eblas venki per nur kvarono aŭ kvinono de la popolaj voĉoj, ĉar ofte partoprenas balotadon malpli ol 50 % de la rajtigitoj. Fojfoje eĉ elektitaj reprezentantoj perfidas la volon de la popolo.

Jomo Ipfelkofer



Pli longa komuna instruado pozitive efikas sur ĉiujn lernantojn.

En la lando de la flavaj bicikloj

Fine de aŭgusto 2010 Moldavio festis 19 jarojn da sendependeco post la kolapso de Sovetunio. Tiam oni prognozis longan, malfacilan kaj ja danĝeran vojon por trovi veran ŝtatecon kaj sendependecon. Multaj intelektuloj en Moldavio volis, ke la lando kuniĝu kun Rumanio, kiel okazis en 1918 post la unua mondmilito.

Provo tia revivigi la nacian konscion de la moldavianoj (pli ol 60 % rumandevenaj) ne plaĉis al Moskvo, ĉiam zorgema pri la „danĝero” de la kuniĝo de tiuj ĉi du rumanaj landoj. Tio montriĝis en la industria evoluo de Moldavio: la plej grandaj fabrikoj situas maldekstre de la rivero Dnestro, kies loĝantoj estas rusamikoj.

Plej streĉaj estis la rilatoj kun Moskvo, kiam en 1991 Moldavio deklaris la rumanan la ŝtata lingvo. Komenciĝis en 1992 milito, kiu daŭris preskaŭ kvin

monatojn. Neniu scias, kiom da homoj pereis: verŝajne plurmiloj. La milito estas notita kiel la unua inter polico kaj armeo: tiam Moldavio ne posedis veran armeon.

Okupata

Argumentis rusoj, ke temas pri milito por „defendi la rusajn civitanojn”. Kaj nun, preskaŭ 20 jarojn post la sendependiĝo, Moldavio ankoraŭ povas konsideri sin ŝtato okupata: daŭre en Transdnestrio restas la 14a rusa armeo malgraŭ promesoj donitaj ĉe diversaj pintkunvenoj (ekz. Istanbulo en 1999) forlasi la teritorion.

En Transdnestrio (39,9 % da rumanoj, 28,3 % da ukrainoj, 25,4 % da rusoj kaj 1,9 % da bulgaroj) regas unika kaj eble la lasta maldemokratia reĝimo en Eŭropo, sub la registaro de Igor Smirnov. Estas nedubeble, ke la tiel nomata pre-

zidanto estas nura moskva marioneto, uzata por ĉantaĝi Moldavion. La oficialaj, ŝtataj lingvoj en Transdnestrio estas la moldava (tio estas la rumana), la ukraina kaj la rusa: parolata tamen estas nur la lasta.

En 2003 la rusa prezidanto Putin provis „transdnestriigi” la tutan Moldavion. La tiama prezidanto de la Moldava Respubliko lasthore rifuzis subskribi la dokumenton. Eĉ se Transdnestrio laŭleĝe apartenas al Moldavio, tamen praktike ĝi estas parto de Rusio. Se tro protestus Moldavio, ĝi riskus ne plu ricevi energion ekzemple de la kompanio *Gazprom*.

Problemo

Nek Eŭropa Unio, nek Nord-Atlantika Traktat-Organizaĵo, nek Usono interesiĝas pri Transdnestrio, timante ofendi Rusion. Intertempe neniu scias, kiam kaj kiel solveblos la problemo. Dume vivas preskaŭ duonmiliono da homoj kvazaŭ en la Eŭropo de la 19a jarcento sub maldemokratia reĝimo, kie vortoj kiel homaj rajtoj ne estas konataj.

Anekdote, pasintan someron mi vizitis bicikle la regionon. Enire, neniu kontrolis miajn dokumentojn. Revene, tamen, post nur du horoj, oni akuzis min, ke mi lezis lokajn leĝojn, ke mi spionis.

Mi estos malliberigita, oni diris, se mi ne pagos monpunon. Obeante, mi petis klarigon pri la leĝoj, kiujn mi rompis. La policano ridante rigardis min, poste mian biciklon kaj respondis: „Vidu vireto, vi tuj pagu la monpunon: via biciklo estas ruĝa, sed ne flava, kiel postulas niaj leĝoj.”



Igor Smirnov, la moldava prezidanto kaj la rusa prezidanto Medvedev.

Pan GAVRILAN

Komuna agado, komunaj valoroj

Eĉ se la policaj ciferoj tre diferencas de la sindikataj, ĉiuj homoj agnoskas, ke la manifestacioj aŭtune okazintaj en Francio atingis neordinare altan nivelon.

Dum pluraj monatoj, multaj manifestacioj sinsekve arigis plurajn milionojn da homoj en kelkcentoj da urboj, kun subteno de pli ol 70 % de la francoj, malgraŭ gravaj ĝenoj. Por la unua fojo jam de tre longe, ĉiuj sindikatoj flankenmetis siajn interfratajn kverelojn por unuvoĉe alvoki la laboristaron defendi siajn emeritajn rajtojn.

Grumblemo

Se oni fidus la gazetarajn raportojn, tia energio rifuzi laboradon ĝis la aĝo de 62 jaroj anstataŭ 60 videble estis malbone komprenata de aliaj eŭropanoj, kiuj ĝenerale emeritiĝas nur ekde la 65a aŭ eĉ la 67a jaraĝo. Oni skribis, ke francoj agas egoisme, aŭ ke ili bezonas de tempo al tempo liberigi sian naturan grumblemon. Kiel kompreni la nunan situacion en Francio?

Post la dua mondmilito, la franca laboristaro sukcesis akiri tre valorajn socialajn rajtojn, danke al multaj bataloj sed ankaŭ dum relative favora ekonomia situacio: sanasekuron tre egalecan, pagatajn feriojn (ekde 1936), familiajn kaj emeritajn rajtojn. Tiuj konkeroj fariĝis valoroj, kiuj cementis la socion.

Konkurencforta

Sed, kiel en aliaj landoj, la situacio malstabiligis ekde la 80aj jaroj, kiam liberalismo tutmonde triumfis: maldungiteco, pli kaj pli da mono en malpli da manoj, streĉaj laborkondiĉoj, sensekura



Sarkozy rapide perdis favoran opinion de la popolo.

estonteco por la venontaj generacioj. Ĉiuj registaroj, dekstraj kaj maldekstraj, vole-nevole iom post iom malkonstruis la socialajn akirojn, por ke Francio estu konkurencforta en nia laŭdire „moderna” mondo.

Rezulte, multaj homoj, ĉefe maldekstruloj, perdis esperon plibonigi sian situacion kaj la mondon. Ili ne plu fidis la politikajn partiojn aŭ forlasis la sindikatojn. La kondutoj fariĝis tre individuaj, dum ĉiu esperas elturniĝi per siaj propraj fortoj por akiri sufiĉan komforton. Resume: ju pli da sociala angoro, des pli da endormiga konsumado.

Ribelo

Paradokse, la ribelo kontraŭ tia situ-

acio okazis danke al la nuna prezidanto, Nicolas Sarkozy, heroldo de liberalismo. La manifestacioj koleris ne nur kontraŭ lia decido nuligi la emeritrajton je 60-jariĝo („mi neniam nuligos ĝin”, promesis li dum sia balotkampanjo) sed kontraŭ lia tuta politiko, kontraŭ la nuna situacio de la franca demokratio.

Kvankam en si mem fundamente prava (necesus aparta artikolo por tion klarigi), la popola postulo defendi la nunan emeritsistemon estis ero el vasta protesto kontraŭ liberalismo.

Referendumo

Ĝi unue esprimiĝis en 2005 okaze de la referendumo pri la eŭropa konstitucio. Tiam voĉdonantoj majoritate rifuzis ĝin, samkiel en Nederlando. Sed la tiama franca registaro tuj perfidis tiun demokratian decidon per novtipa traktato de Lisbono, pri kiu rajtis voĉdoni nur la deputitoj.

Granda rankoro naskiĝis kontraŭ la deputitoj, dekstraj kaj maldekstraj, kiuj grandparte akceptis partopreni tiun perfidon. Ampleksiĝis la kolero, kiam Sarkozy tre rapide fanfaronis post sia venko en 2007. Apenaŭ elektita, li atribuis al si salajron 172-elcente pli altan ol tiu de la antaŭa prezidanto Chirac, dum la plej multaj salajroj stagnis aŭ malkreskis.

Restoracioj

Li organizis por siaj elstaraj subtenantoj – artistoj, financistoj, ĵurnalistoj – grandan festenon en unu el la plej renomaj kaj ŝikaj restoracioj de Parizo. Li krozis sur tre luksa ŝipo de entreprenisto, kiu delonge profitas de la publika mono. Li defendis tre favorajn impostajn avantaĝojn por la plej riĉaj socitavoloj.

Li aperis ĉiutage en la gazetaro kaj en la televido eĉ por privataj aferoj, ĝis naŭzo de la spektantoj. Ju pli li publike aperis, des pli liaj diraĵoj malfidindis. Li ĉiudirekten agis por atingoj tro ofte nulaj. Eĉ kelkaj el liaj sloganoj, kiel „Labori pli, por gajni pli”, estas nun preteksto por tre sukcesaj ŝercoj.

Revelacioj

Sarkozy rapide perdis favoran opinion de la popolo, eĉ de multaj homoj, kiuj voĉdonis por li. Tiu situacio grave evoluis dum la lasta somero pro multaj, ĉiutagaj skandalaj revelacioj pri la afero Bettencourt. Liliane Bettencourt posedas luksan firmaon „L'oréal” kaj estas unu el la plej riĉaj homoj de la mondo.

Danke al kaŝita registrado, kies ĉefaj eroj estis diskonigitaj de multaj gazetoj kaj radioj, francoj komprenis, kiom fortaj estas la ligoj inter la politikistoj kaj la mona mondo, la alta burĝaro. Impostoj ridinde malgrandaj rilate riĉojn, grandaj sumoj kaŝitaj en multaj senimpostaj paradizoj, kontraŭleĝa mondonaco al politikistoj, subaĉeto de altranga prokurora amiko de Sarkozy, kaj impliko de la buĝeto-ministro, Eric Woerth, kiu samtempe estis la kasisto de la dekstra partio, kiu organizis la venkon de Sarkozy, ktp, ktp.

Kofroj

Dum kelkaj semajnoj, francoj ne kre-dis siajn orelojn aŭskultante la radiojn, kaj frotis siajn okulojn legante la gazetojn. Tiuj riveloj multe pli efikis ol iu ajn politika kurso. Ilia fulmrapida lernado tuj koliziis kun la anoncita volo de la registaro modifi la emeritavantaĝojn, „ĉar ne plu estas sufiĉe da mono en la ŝtataj kofroj”. Despli, ke la respondeculo pri tiu reformo estis Eric Woerth mem.

La popolo koleris kaj laŭtvoĉe esprimis tiun koleron. Dekstraj kaj maldekstraj homoj certe ne antaŭvidis saman vojon por elturniĝi, sed havis komunan senton: ili ne plu volis vivi en tiom skandala situacio. Ili volis pli justan socion. Tiu sento trairis la konversaciojn ne nur dum la manifestacioj, sed ankaŭ en la laborejoj kaj oficejoj, ĉe la frizisto, okaze de familiaj kaj amikaj vespermanĝoj.

Kritikoj

La leĝo estas oficialigota sen notindaj modifoj malgraŭ kritikoj kaj diversflankaj proponoj. La registaro malmilde venkis. Tamen la sindikata kaj politika pejzaĝoj videble ne plu similos al la antaŭaj.

La du grandaj partioj, la dekstra

UMP kaj la maldekstra PS, esperas nun trankvile, for de la danĝeraj surstrataj tumultoj, sin prepari por la prezidanta baloto okazonta en 2012. Malgraŭ mal-similaj deklaroj kaj pozicioj, ambaŭ kvazaŭ sammaniere gvidis la registaron kaj ofte ne plu havas plenan fidon de siaj elreviĝintaj voĉdonantoj.

Promesoj

Verŝajne ekstremdekstruloj kaj maldekstraj radikalaj partioj fortigos siajn rangojn, sed ankaŭ multaj homoj opinias, ke demokratio ne limiĝas al balotado kaj politikaj promesoj tuj poste neplenumitaj aŭ perfiditaj. Ili sopiras al kontraŭpovaj strukturoj liberaj kaj kontroleblaj.

Ankaŭ la sindikata pejzaĝo evoluis. Videble, la reformistaj sindikatoj esperis saĝan traktadon kun la registaro, sed ili estas elmetataj samtempe al sarkozia rigideco kaj al tre forta premo de sia bazo, kiu firme rifuzis la priemeritiĝan projekton.

Solidareco

La unuecaj kaj bone organizitaj manifestacioj havis pli kaj pli da neatendita sukceso kun partopreno de ĉiuj generacioj. Plie, en multaj uzinoj, firmaoj, la laboristoj organizis ĝeneralajn asembleojn kaj prenis poziciojn sendependajn de siaj sindikataj „hierarkioj”. Ili reinventis tre radikalajn armilojn kun subteno de multegaj civitanoj: unueco, interprofesiaj kunagadoj, pribatala memmastrumado, laborklasa solidareco, ekonomiaj blokadoj.

Francoj iom post iom perdis siajn socialajn avantaĝojn, kiuj dum pluraj jardekoj cementis la landon. Sed en la ĵus okazinta movado multaj homoj rekonsciiĝis, ke ili apartenas al la sama ekspluatata klaso. Dum la multaj kaj imponaj manifestacioj ili videble reakiris komunan valoron: ne ekzistas inda socio sen solidareco. Nun restas demando: kiujn vojojn ili elektos por ĝin konkretigi?

Yves NICOLAS

NIGERIO

Horor-minado

En la norda niĝeria ŝtato Zamfara mortis pli ol 3000 homoj, ĉefe virinoj kaj infanoj, pro kontraŭleĝa or-minado. La krizo lastatempe akriĝis en vilaĝoj apud la ŝtata ĉefurbo Gusau, kie pro neklaraj kialoj malsaniĝis kaj poste mortis 900 infanoj.

La internacia neregistara organizaĵo Kuracistoj sen Limoj kun federaciaj instancoj esploris kaj konstatis, ke tieaj riveroj estas poluitaj de plumbo. La metalo eniris la akvon pro kontraŭleĝa or-minado.

Ŝajnas, ke vilaĝanoj kaŝe portis hejmen rokojn enhavantajn la oron. Dum provoj eligi la riĉaĵojn, kunmiksita plumbo eniris la riverojn, kiuj solaj provizas ilin per akvo por trinki kaj kuiri.

Kultivi

La federacia registaro nun haltigas kontraŭleĝan minadon aŭ prilaboron de oro. Krome vilaĝanoj ne plu rajtas kultivi sian teron pro la risko, ke ankaŭ la grundo estas poluita.

Ĉar Niĝerio enspezas vendante nafton, ĝi neglektas siajn aliajn naturajn riĉaĵojn. Verŝajne do daŭros kontraŭleĝa minado, ĉar tiel riĉiĝas kaj en- kaj ekster-landanoj.

Intertempe Kuracistoj sen Limoj kaj federaciaj agantoj restas en Gusau por provi savi la vivojn de pliaj viktimoj de la minado.

Princo Henriko OGUINYE/pg

KIPRO

Ĉasantoj ĉasataj



Muflono fariĝis simbolo de la kipra flugkompanio Cyprus Airways.

Kipro estas verŝajne la sola lando en Eŭropa Unio, kiu dediĉis la nacian flankon de la 1-, 2-, kaj 5-cendoj de siaj eŭro-moneroj ne al historia persono, ne al antikva monumento, sed al besto.

Tio povus surprizi turiston, sed tute ne kipranon, por kiu muflono (aŭ pli precize loka speco de muflono, kies scienca nomo estas *ovis orientalis ophion* aŭ *ovis gmelini ophion*) estas unu el la plej malnovaj emblemoj de la lando.

La kipra muflono ekzistas en neniu alia lando de la mondo kaj estas atestita sur la insulo jam 6000 jarojn antaŭ la komuna erao. La besto fariĝis simbolo de la kipra flugkompanio *Cyprus Airways*.

Protekti

Nuntempe la registaro kaj la polico de Kipro klopodas protekti la muflonojn, kies nombroj – neniam grandaj – dum lastaj jaroj rimarkinde ŝrumpis pro ŝtelĉasado.

Temas pri situacio, kiu alprenas pli kaj pli grandajn dimensiojn, malgraŭ la intensigado de kontroloj kaj la persekutado de respondeculoj. Konstateblas, ke en Kipro ekzistas pluraj ĉasistoj, kiuj ne hezitas buĉi la malabundajn kornohavajn muflonojn por riĉiĝi.

Ŝajnas eĉ pli nekredeble, ke en la tiel nomata insulo de Afrodito estas tiuj, kiuj pretas elspezi ĝis 50 eŭrojn kontraŭ ĉiu kilogramo da – laŭaserte – bongustega muflona viando.

Spurado

La plej freŝa okazo estis en septembro. Viro, eksuspektinte ĵipon parkumitan je nekutima horo apud la arbaro de Pafoso (naturparko konata kiel unusola vivejo de muflonoj), avertis la policon. Post longa kaj malfacila spurado, kiu memorigis pri usonaj detektivfilmoj, la polico blokis la aŭtomobilon. Ĝin stiris 21-jara lokulo en kompanio de tri apenaŭ buĉitaj muflonoj destinitaj – kiel la ceteraj – al la pladoj (kaj ventroj) de respektindaj gastoj.

Tiel daŭras la batalo kontraŭ la ŝtelistoj. Ne sen sukceso: ekzistas nun ĉ. 30 000 muflonoj en Kipro (en 1930 nur kelkdekoj). Cetere, kreskanta nombro da civitanoj deklaras sin preta defendi kontraŭ estingo unu el la kipraj simboloj, pri kiuj ili fieras.

Roberto PIGRO



Muflono: unika kipra besto, sed konstanta predo de ŝtelĉasistoj.



Artikolojn pri la vivo en via regiono sendu al moderna_vivo@monato.net

Simplaj solvoj por premaj problemoj

Kutime eblas solvi problemojn laŭ pluraj vojoj. Solvo povas esti komplika kaj multekosta, sed ofte eblas solvi la saman problemon per tre simpla metodo. Uzi la plej taŭgan solvon gravas en riĉaj regionoj, sed ankoraŭ pli gravas en landoj, kiuj havas nur malmultajn rimedojn.

Howtopedia (proksimuma traduko: „kiel-pedio”) estas senprofitcela asocio bazita en Zuriko, Svislando. Ĝi klopodas tutmonde apliki teĥnologion simplan kaj fidindan, uzante lokajn rimedojn. Ĝi dependas ĉefe de donacoj kaj de volontuloj, kiuj alportas ideojn kaj kiuj verkas kaj tradukas artikolojn por www.howtopedia.org, vikipedio-stila retpaĝaro.

Argilaj potoj

Bela ekzemplo estas la t.n. *zeerpoto*, kiu en varma loko kapablas konservi manĝaĵojn je temperaturo de 15° C. Kiel? Oni prenas du argilajn potojn de iom malsama grandeco. En la plej granda oni metu tavolon de sablo. La malpli grandan poton oni metas en la grandan kaj plenigas la spacon inter ambaŭ potoj per sablo.

Tiam oni humidigas la sablon per akvo, metas la konservotajn manĝaĵojn en la malgrandan poton kaj kovras la tuton per tuko. La akvo inter la potoj vaporigas kaj tiel malvarmigas la internan poton. Oni dufoje tage rehumidigas la sablon. La „fridujo” funkcias nur en seka regiono.

Tiel ne nur estas solvita problemo (konservado de manĝaĵoj), sed tio ankau povas esti bazo de eta loka in-

dustrio, kiu produktas kaj vendas potojn, tiel evitante aĉeton de pli kostaj importitaj varoj.

Valoraj artikoloj

La baza ideo estas bona kaj sur la retpaĝo troveblas dekoj da valoraj artikoloj. Tamen restas multo farendi. Entute la anglalingva versio havas nur kelkajn centojn da artikoloj; la franca, araba kaj hispana versioj multe malpli. Tradukoj al aliaj lingvoj estas planataj, sed ankoraŭ mankas. Pri multaj titoloj, kiuj aperas en la indeksoj, estas neniuj tekstoj aŭ nur kelkaj frazoj, kaj la klarigoj aŭ la desegnaĵoj estas malbonkvalitaj.

Alia ofta kritiko: la informoj troveblas nur interrete kaj tiuj, kiuj plej bezonas ilin, ne havas ret-aliron. Eblas respondi, ke en ĉiuj landoj almenaŭ kelkloke estas facila retaliro kaj ke tieaj personoj povas pristudi kaj transdoni la sciojn.

Por kunlabori necesas antaŭe registri sin, donante informojn pri teknikaj kaj lingvaj kapabloj.

Roland Rotsaert



Zeerpoto, kiu en varma loko kapablas konservi manĝaĵojn.

Freŝa leĝo, freŝa aero

Bona novaĵo por grekaj nefumantoj: la 1a de septembro 2010 fariĝis la tago, kiam, post pluraj fiaskintaj leĝproponoj, definitive estis malpermesite fumi ne nur en publikaj lokoj kiaj trinkejoj, restoracioj, bankoj kaj butikoj sed ankaŭ en oficejoj kaj aliaj laborlokoj.

Ĉu nur plia blufi konformiĝi al internaciaj direktivoj en lando kun la plej alta elcentaĵo (40 %) da fanatikaj fumantoj? Tute ne. La leĝo, simila al tiu en Italio kaj aliaj ŝtatoj de Eŭropa Unio, validas senescepte en ĉiuj publikaj ejoj. Malobservado estos traktita per monpunoj ĝis 10 000 eŭroj. Lokoj, kie oni la kvaran fojon malobservas la leĝon, estos dum 10 tagoj fermitaj; la kvinan fojon ties posedantoj perdos sian licencon.

Obstrukco

Ŝajnas, ke ĉi-foje la greka ministerio pri sano agas serioze, celante forigi miskutimon, kiu ĉiujare malsanigas kaj mortigas milojn da grekoj. La leĝo sekvas antaŭajn provojn, kiuj malsukcesis pro la obstrukco de estroj kaj klientoj de kluboj, kafejoj kaj koncertejoj neimageblaj sen fumantoj.

Nun, tamen, la registaro ne toleris protestojn. Kaj ŝajnas, ke ĝia batalkrio kontraŭ fumado ja trafis la orelojn de la grekoj. Dum la unuaj tagoj post la malpermeso ĝi ricevis milojn da voko de tiuj, kiuj volis raporti malobservadojn.

Aliflanke ne mirinde. La greka popolo fine ekkomprenas, danke al novaj studaĵoj, la danĝerojn de fumado kaj aktiva kaj pasiva. Samtempe ĝi lernas, ke la sano de plimulto pli gravas ol la profitoj de malplimulto.

Roberto Pigro



FUNGOJ

Malbonan apetiton

specon de fungo – verdan muŝfunĝon. Manĝinte ĝin, la unuan tagon la viro bone fartis. Li ne sciis, ke la unuaj simptomoj pri veneno ne tuj evidentiĝas. La dua tago ne tiom agrablis, ĉar aperis sango. Post kelkaj tagoj la viro eniris hospitalon, kie la kvinan tagon li mortis.

Distraĵo

En Litovio, kie fungokolektado estas tradicia distraĵo, kaj fungo bongusta manĝaĵo, kreskas ĉ. 300 specoj da manĝeblaj fungoj kaj ĉ. 100 venenaj. La plej venenaj estas la verda kaj la pala muŝfunĝoj. Sufiĉas unu fungo tia por mortigi homon. La veneno ne ŝanĝiĝas

dum kuirado, bakado aŭ konservado.

Tiu, kiu manĝis venenan muŝfunĝon, la unuan tagon nenion sentas. La duan komenciĝas vomado kaj notindas ventrodoloroj kaj lakso. La trian pliboniĝas la situacio, sed videblas laboratorie spuroj de peza hepata lezo. La kvaran aperas sango el la digesta sistemo. La kvinan rompiĝas la cerbo kaj malaperas la konsciiĝo, kaj la sesan komenciĝas akuta nefrito. Kutime la sepan tagon mortas la fungo-manĝinto.

LAST

Foto: Manĝindas nek muŝfunĝoj nek aliaj fungoj nekonataj.

Viro el vilaĝo apud la litova ĉefurbo Vilnius, aŭdinte pri la morta danĝero de muŝfunĝoj, decidis mem elprovi, ĉu tio ne estas nur klaĉo. Pasintjare li kuiris kaj manĝis ruĝan muŝfunĝon. Nenio malbona okazis. Tial li konkludis, ke rakontoj pri toksoj mortigaj estas nuraj elpenaĵoj.

Ĉi-jare la 50-jarulo decidis testi alian

IRANO

Perfote kontraŭ perforto

Pli kaj pli ofte irananoj protestas kontraŭ la devigo surhavi kaptukon. Jen du kuraĝulinoj, kiuj fotigas sin nudkape sub ŝildo, kiu diras: „Laŭ la 638a artikolo de la islama punleĝo estas krimo forpreni kaptukon kaj ŝajnigi sin ne konsideranta la islama leĝaron. La krimantojn oni povas enprizonigi ĝis dum du monatoj.”



Ŝafhundo senlima



Ŝi povas distingi 340 objektojn kaj rekonii bildojn: tial la sepjara kvarpiedulino Betsy el Vieno estas konsiderata la plej saĝa hundo en la mondo. Raso: landlima ŝafhundo.

Betsy surprizis en frua aĝo sian posedantinon per bona parolkompreno. Se tiu nomis objekton, la hundino malaperis kaj post kelka tempo revenis kun ĝi en la buŝo. Se la virino menciis hundorimenon, Betsy poste venis kun ĝi – sammaniere okazis je la balailo, kiun la hundino klare distingas de balailito.

Karoto

„Ĉio komenciĝis, kiam nia favoratino aĝis kvar aŭ kvin monatojn”, rememoras

la posedantino. „Betsy tiam subite ekis alporti aĵojn, pri kiuj ni en la momento parolis. Tutegale ĉu karoto, fromaĝo aŭ kaŭĉuka kolbaso.”

Reprezentantoj de la *Guinness*-libro de rekordoj kontrolis ŝiajn eksterordinarajn kapablojn, kaj sciencistoj el Max-Planck-instituto en Lepsiko (Germanio) konfirmis la nekredeblan inteligenton de Betsy.

Landlimaj ŝafhundoj estas aparte Lernemaj kaj kun pudeloj apartenas al la plej saĝaj hundorasoj.

Evgeni GEORGIEV

Foto: Betsy estas la plej saĝa hundo en la mondo.

ALBANIO

Trezoro dis„put”ita



En albanaj teritorioj dum la otomana periodo, precipe dum la lastaj jardekoj de la 18a kaj la unuaj de la 19a jarcentoj, regis du paŝaoj albandevenaj, Buŝatlio norde kaj Ali Paŝao Tepelena sude.

La du homoj riĉiĝis, kaj la trezoro de Ali Paŝao fariĝis legenda sed samtempe mistera. Laŭdire konservis ĝin lia lasta junaĝa edzino Vasiliki. Pro tio arkeolo-

goj grekaj kaj aŭstraliaj decidis serĉi la trezoron en vilaĝo portanta la nomon de Vasiliki, 300 km norde de Ateno.

Krizo

Parto de la trezoro, se trovita, tuj transpasis al la greka registaro, kiu aktuale troviĝas en financa krizo. Tamen leviĝis voĉoj en Albanio, protestante, ke

la trezoro – eble 30 tunoj da oro – aparteninta al albana paŝao iru al Albanio.

Fosadis kaj fosadis la trezorserĉistoj sed trovis fine, anstataŭ oron, nur profundan, ordinaran kaj malplenan puton. Okazis kiel diras albana proverbo: la monto graviĝis sed fine naskis nur muson.

Bardhyl SELIMI

HUNGARIO

Ruĝŝlima „vulkano”

Lundon la 4an de oktobro, apud la urbo Ajka situanta 125 km sud-okcidente de Budapeŝto, rompiĝis angulo de baseno, kie oni deponis ruĝan ŝlimon, rezultantan el la produktado de aluminio. Inter 600 000 kaj 700 000 m³ da ruĝa koto kun pH inter 11 kaj 13 fluis laŭ la apuda rivereto, inundante proksimajn vilaĝojn. Thierry Salomon vizitis la vilaĝojn trafitaĵn kaj sendis la jenan raporton.

Du tagojn post la katastrofo mi alvenis por helpi al eksterlanda sendito de radiostacio. Estis jam nokto, merkredon, kiam ni atingis Kolontár, la vilaĝon plej trafita de la ruĝŝlima torento. Jam kelkajn kilometrojn antaŭe videblis ruĝa koto sur la vojo kaj rande de ĝi. Unue ŝajnis, ke la okraĵo fluis ĝis tie. Sed poste, ĉar la vojo iris denove suben kaj venis kamionoj el la kontraŭa direkto, evidentiĝis, ke temas nur pri koto, kiu elfalis el la ŝarĝaŭtoj.

Mitraleto

Iom pli for, dekstre de la ŝoseo, eblis

pro la nokto nur diveni la randojn de la basenegoj. Gardistoj kaj kamionoj baris la vojon kondukantan al la rompita flanko. En la vilaĝo mem eblis aliri la centron nur post montrado de ĵurnalista karto. Sur la teraso de la kulturdomo ripozis kelkaj fajrobrigadistoj. Soldatpolicistoj kun mitraleto enmane gardis la evakuitan parton de la vilaĝo. Forirante, ŝoforo de kamiono por lavi stratojn klarigis, ke ili estis plurope speciale venigitaj el la ĉefurbo.

Ĵaŭdon matene antaŭ Kolontár, dekstre, kaj nun en taglumo, la muregoj de la basenoj aspektis altaj kiel kvinetaĝa

domo. Sur la parkumejo antaŭ la kulturdomo svarmis la veturiloj de ĵurnalistoj el plej diversaj landoj. La suno brilis, sed estis nek varme nek malvarme.

Ŝoveliloj

Same kiel la antaŭan vesperon eblis flari nenion specialan. Eble nur odoreton de antaŭ nelonge purigita banĉambro. Krom la diverslingvaj frazeroj de la ĵurnalistoj oni aŭdis bruon de ŝoveliloj kontraŭ asfalto kaj la atentigan signalon, kiun kamionoj eligas, kiam ili malantaŭeniĝas. Post ekiro piede en la straton Lajos Kossuth [lajoŝ koŝut]



THIERRY SALOMON



THIERRY SALOMON



THIERRY SALOMON



THIERRY SALOMON

la speciale lastminute aĉetitaj botoj evidentiĝis nepraj.

Rande apud ambaŭflankaj fosaĵoj kuŝis ankoraŭ kelkcentimetra kototavolo. Homoj en blankaj protektovestaĵoj ĉie: soldatoj, fajrobrigadistoj, volontuloj. Makuloj sur la muroj atestis la altecon de la torento, kelkloke pli alta ol homo. Eĉ fenestrojn ĝi rompis. Plej multaj homoj ŝoveladis. Kelkaj surhavis protektokulvitrojn por eviti, ke la malacidega ŝlimo eniru la okulojn. Per elektraj segiloj oni distranĉis la palisarojn ĉirkaŭ la domoj, por ke buldozoj pli facile povu forigi la teron el la ĝardenoj. La mortkondamnitajn arbojn oni tuj ekzekutis.

Liko

Kamionegoj forportadis la koton. Preskaŭ finita tute nova domo staris verŝajne neniam loĝota. Malantaŭ la ĝardenoj videblis detruitaj maizkampoj. Plasta rezervujo de trinkakvo staris antaŭ la monumento de la mondmilitoj. La vilaĝanoj volonte intervjuiĝis; ja ne estis io alia por fari. Maljunulino rakontis,



kiel ŝi saviĝis, alkroĉiĝinte al trabo. Alia loĝanto menciis, ke jam meze de la 80aj jaroj okazis eta liko el la baseno. Hispanlingva televidstabo sen interpretisto provis intervui vilaĝanojn, alparolante ilin per *catástrofe*?

La drinkejo, kiu staras iom pli supre ĉe la enirejo de la ĉefstrato, ne estis trafita. Sed nigrakadra mortanonco pendis apud la pordego. En la korto ripozis volontuloj kaj ĵurnalistoj. Reprezentantoj de *Greenpeace* donis intervjuojn.

Torento

Iom poste oni permesis eniri en la

plej damaĝitan parton de la vilaĝo. Super la rivereto Torna la armeo rekonstruis provizoran feran ponteton. Soldatoj notis, kiu transiras, kaj kiam oni revenas. Aliflanke la fluaĵo forbalais la teron sub la relparo. Ĉi tie la torento ŝajne ĉie atingis altecon de preskaŭ du metroj. Muro de domo duonkolapsis. Kadavroj de aŭtoj. Tute fine de la vilaĝo kiel simbolo staris draŝrikoltmaŝino, kies marko estas *Fortschritt* („progreso”, germane).

Posttagmeze, ĉar vidiĝis pli kaj pli da homoj kun blanka protektomasketo, ankaŭ ni akiris tian en la kulturdomo. En la sekva urbeto, Devecser videblis similaj scenoj en la plej malaltaj kvartaloj. Ĉar mi devis reiri Budapeŝton vendredon, mi lasis miajn botojn kaj masketon al tiu, kiu venis anstataŭi min.

Nur nun, skribante ĉi tiun teksteton, mi rimarkas, ke fakte tiuj homoj vivis kvazaŭ en unukilometra proksimeco de ĉ. 15 metrojn alta vulkano, kies lafo ne varmas, sed tamen ruĝas kaj brulas.

Thierry SALOMON



ISBN: 90 77066 22 5
Pezo: 320 g
#Prezo ĉe FEL: 24,00 € +
afranko (tradicia bindita
versio), 14,40 € (ePub aŭ
Mobipocket).

Sen Rodin

Bildoj pri Norda Lando kaj aliaj rakontoj

Juna Sudlandano vizitas landon de Nordanoj ... enamiĝas en ĝi, kaj en Nordlandanino. Kiel noktopapilio li ne povas rezisti kaj tuj reiras por kaptiĝi en lanternan fajron, senbedaŭre kaj konscie.

Ĉiu ĉapitro estas aparta originala noveleto pri iu aŭ alia norda gemo. La novelaron sekvas alia novelaro de aliaj apartaj kaj tre allogaj miniaturoj.

Donald Broadribb pri ĝi komentis: „Ĉi tiu kolekto de 51 rakontoj rangas inter la plej majstraj verkoj de la aktuala esperanta literaturo. Certe ĝi rangas apud la noveloj de Trevor Steele; kaj el la ĉefaj novelmajstroj de nia pasinteco, apud tiuj de Stellan Engholm kaj Ferenc Szilagyi.”

Mendu ĉe Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio;
www.retbutiko.net, retbutiko@retbutiko.net, aŭ ĉe via kutima librejo.

Lernejoj en akvo



GBEGLO KOFFI



GBEGLO KOFFI

Estas la fino de la paŭzo kaj jen la gelernantoj iras al la klasĉambroj. Ili iras sur la pontetoj el pneŭoj kaj brikoj. Videblas la konstruaĵoj kaj la akvo kovranta la korton. Kiom malpura kaj malbonodora estas la akvo!

La 13an de septembro 2010 malfermiĝis la lernejaj pordoj en Togolando. Dum iuj gelernantoj senprobleme ekiris al la lernejo, aliaj ĝis nun restas hejme. Ĉu pro la nepovo de la gepatroj pagi la lernokotizon?

Oni povas memori, ke en aŭgusto 2008 inundo okazis en Togolando. Tiam homoj iĝis senhejmaj kaj devis ekloĝi en lernejoj. Iujn el tiuj atakis la akvo. Tial la registaro estis devigita prokrasti je du semajnoj la komencon de la nova lerneja jaro. Pasis tiu tempo, sed ne ĉiuj lernejoj seniĝis je akvo. Tamen komenciĝis tiam la lerneja jaro. Ĉiuj tiam pensis, ke nenio tia plu okazos en Togolando. Bedaŭrinde la lerneja jaro 2010-2011 rezervis alian surprizon al la gelernantoj kaj iliaj gepatroj.

La 13an de septembro 2010 en pluraj lernejoj en Lomeo (ĉefurbo de Togolando) ankoraŭ estis pluvakvo. La tuta lernejo dronis en akvo, kio malhelpis la gelernantojn komenci la novan jaron. Tamen jen iuj gelernantoj kaj geinstruistoj spitis la akvon kaj komencis la laboron, malgraŭ flakoj en la klasĉambroj. Certe ne ĝojis la akvo, ke homoj loĝas kun ĝi en la klasĉambroj. Jen la 18an de septembro 2010 pluvis la tutan tagon, kaj nun tutajn klasojn plenigis la akvo, tiel ke neniu povas eniri. En iuj lernejoj ne estas akvo en la ĉambroj, sed tiom da akvo ĉirkaŭ ili, ke ne eblas aliri ilin. Ĉu la gelernantoj restu hejme? Pripensiga afero.

Uzitaj pneŭoj

La geinstruistoj kaj gepatroj interkonsiliĝis, kaj jen ili fabrikis ion pontecan el uzitaj pneŭoj de aŭtegoj kaj el brikoj, ke la gelernantoj, unu post la alia, aliru la restintajn ne okupitajn klasĉambrojn. Necesas esti tie por vidi,

kiel dancas geinstruistoj sur pneŭoj irante al la klasĉambroj. Estas tute aparta spektaklo. La kurshoroj reduktiĝis, ĉar estas malfacile uzi kelkajn klasĉambrojn por pli ol dek klasoj. Tamen pli bone havi iom ol neniom. Jen la gelernantoj nun kontentas pri la iomo nun instruata al ili. Oni povas demandi kiam kaj kiel reagos la registaro.

La akvo tiom multas en lernejoj, ke ne pli frue ol en januaro 2011 ĝi povos tute malaperi. Aŭtoritatuloj vizitas la lernejojn, fotas la aferojn kaj reiras. Jam pasis pli ol tri semajnoj post la eko de la nova lerneja jaro, sed nenio reago de la registaro aperis. Dume la geinstruistoj kaj gelernantoj, unu post la alia, uzas la pontetojn por atingi la klasĉambrojn. La lernejo CEG Anfame estas unu el la lernejoj inunditaj. Jen fotoj pri ĝi!

GBEGLO Koffi



Estas paŭzo. Du instruistoj kaj gelernantoj estas videblaj kun vendistinoj de nutraĵoj.



La korto akvoplena.



Pli klare videblas la instruistoj kaj vendistinoj de nutraĵoj.

Strato de la eŭropa kulturo

En tiu ĉi jaro en Santiago de Compostela [kompostela], urbo en la ekstrema okcidento de Hispanio, regurbo de la aŭtonoma regiono Galegio, oni festas „sanktan jaron”, kiu altiras amasojn da homoj, precipe ĉirkaŭ la 25a de julio, kiam la memortago de la sankta Jakobo trafas en dimanĉon, kio elstarigas la tutan jaron antaŭ la ordinara pilgrimado.

Ekesto

Lapilgrimado al Santiago komenciĝis antaŭ pli ol 1000 jaroj, post kiam ĉirkaŭ la jaro 800 Teodomiro, episkopo de la regiono, deklaris, post mirakla ektrono de tombejo loka de la nuna katedralo, homajn restaĵojn la ostoj de la apostolo Jakobo la pli aĝa, parenco de Jesuo, kiun liaj disĉiploj laŭ la legendoj enterigis post la martiriĝo ne en la „Sankta

lando”, sed ĝuste en tiu ĉi mondoparto. De post la retrovado de la sanktulaj relikvoj ekestis modera kultado regiona. Dum la kristana lukto kontraŭ la islamaj invadintoj de la iberaj teritorioj, Jakobo transformiĝis en la grandan helpanton kaj protektanton de la kristanaro, aparte post kiam li intervenis persone en la batalo de Klaviĥo. De tiam la ikonografio montras lin surĉevale, disbatante la malamikojn. Ekestis lia kromnomo *Mata-moros*, t. e. mortiganto de maŭroj, kiel oni nomis la islamanojn.

Mezepoko

Ĉiam pli la famo de la sanktulo kaj ĝia kultejo disvastiĝis tra la tuta Eŭropo. Kiam kadre de la *reconquista*, la rekonkerado de la lando, la vojoj en norda Hispanio montriĝis sekuraj, komenciĝis

ĝenerala pilgrimado al Kompostelo el ĉiuj kristanaj landoj. La urbo fariĝis la tria sankta loko apud Jerusalemo kaj Romo. Papo Kaliksto la 2a permesis la sanktajn jarojn, kiuj okazis eĉ pli ofte ol tiuj en Romo mem. En tiuj jaroj oni, traŭtante la „Sanktan pordon” aŭ „Pordon de la pardono”, preĝante kaj la pentojn konfesante, povas akiri aparte savigajn indulgojn.

Mezepoke la pilgrimado al Santiago – al la sanktulo kaj la urbo samnoma – fariĝis amasfenomeno kaptanta ĉiujn sociajn tavolojn. Kreiĝis impona infrastrukturo por direkti kaj kontentigi la homojn kaj iliajn bezonojn. Kun la reformacio kaj novaj evoluoj ŝtataj, ekonomiaj, spirita kaj sociaj perdiĝis la tutkontinenta aspiro al tiu ĉi celo. La kulto tie ree fariĝis preskaŭ ekskluzive hispana / regiona evento. En la dudeka jarcento la ŝtatestro Franco, mem devenante el Galegio, reproduktis la kultadon, sed nur ĉirkaŭ la 80aj jaroj nova impeto favoris la Vojon Jakoban ĝis reakcepto inter homamasoj el tuta Eŭropo kaj rekono de internaciaj instancoj, kun ĉiam ankoraŭ kreskanta efiko.

Motivoj kaj metodoj

La plej nobla celo de la mezepokaj pilgrimantoj estis la akiro de indulgo por la propraj aŭ aliulaj pekoj ĉe la tombo de la sanktulo, prefere, ĉar plej efike, en la sanktaj jaroj. Kaj ne nur la fora urbo estis alstrebinda, sed survoje la multaj preĝejoj, katedraloj, monaĥejoj kaj benaj lokoj adiciiĝis al la kolektado de sanktulaj kaj diaj gracoj. La religia fono tiam ja unuarange rolis, sed certe ankaŭ eskapemaj, aventuremaj, komercaj, sociaj, diplomaciaj kialoj. En la nuna tempo la eklezie ligitaj intencoj



RITA RÖSSLER-BUCKEL

La signo de la konko gvidas la pilgrimantojn.



RITA RÖSSLER-BUCKEL

Pilgrimantoj survoje en verda Galegio.

estas minoritataj. Homoj ankaŭ aktuale ja serĉas spiritan plenumiĝon, sed ofte ne laŭ la tradiciaj kanaloj. Firma kredo apudas svagan esoterecon, nerare sojle de nova vivetapo, en aŭ post malsanoj. Intermiksiĝas turismaj, artemaj, sportaj intencoj. Hodiaŭ oni nemalofte akceptas ofertojn de vojaĝentreprenejoj dividi tempe kaj distance la longan vojon en komfortajn etapojn per same komfortaj transportiloj kaj en luksaj dormejoj.

Simpleco, modereco, modesteco ne plu estas ĝeneralaj trajtoj, por tute ne paroli pri asketeco. Tio influis ankaŭ la vojaĝmetodojn. Tien kaj reen tra pli ol dufoje 2000 kilometroj pure piede okazas tre malofte. Multaj homoj komencas la marŝadon nur ĉe Pireneoj, reire oni flugas preskaŭ regule. Helpas ankaŭ busoj, taksioj, privataj aŭtoj, ŝipoj, pakaĵotransportado. Sportemuloj rajdas, biciklas aŭ eĉ vetkuras konkurencante. Kaj per poŝtelefono kaj interreto oni ne plu devas senti sin en fremdejo, sed povas eldistance stiri siajn hejmajn familianojn, akciojn kaj bezonaĵojn, kaj samtempe kapablas en la proksimeco mendi ĉambrojn kaj mangaĵojn je aktuala impulso. Neniu plu dependas de sanktuloj aŭ bonvolaj pilgrimejoj. Troviĝas nur malmultaj aŭtentaj pilgrimantoj, kiuj intence rezignas pri eksteraj kontaktoj kaj helpoj, konfidantaj sin senrezerve al la *camino* (vojo).

Konfirmilo

Por ricevi de la ekleziaj aŭtoritatoj en Santiago la konfirmilon pri „vera pilgrimado devote kaj pie”, oni devas atesti per fidindaj stampiloj en sia pilgrimkajero la piedan trairon de la lastaj 100 kilometroj antaŭ Santiago. Jam la ekstera aspekto, la diraĵoj kaj la konduto de multaj atendantoj en la longega vico antaŭ la ĝiĉetoj dokumentigaj suspektigas tiujn motivojn sufloratajn en la latinlingva dokumento. Kvankam nun multaj atendas la konfirmilon *compostelana*, tamen la nombro de tiuj pretendantoj estas malgranda kompare kun tiu de ordinara turistoj. En 2004 nombriĝis 180 miloj da „pilgrimantoj” kontraŭ 12 milionoj da turistoj. La lastaj estas kontentaj per

fotoj dissendadataj interrete, montrantaj ilin en tipa restoracio en Santiago aŭ survoje. Ili ne aspiras paperaĵon por ŝajnigi pilgriman karakteron.

Konsilioj

Sciante, ke la nuntempa ĝenerala strebo al Santiago de Compostela havas nepretervideble siajn komercajn, turismajn, modajn trajtojn jam superantaj la bezonojn spiritajn kaj kulturajn, pli konsciaj pilgrimantoj tamen senhezite rekomendas entrepreni la Vojon de Sankta Jakobo. Sendepende de la irmaniero ĝi povas havigi mensan pliriĉiĝon kaj ensentadon en la kulturan heredaĵon de Eŭropo. La titolo de vojpriskribo post spontana ekiro de iu germana popolhumuristo „Jen, mi estas for!” logis ja multajn liajn admirantojn al Santiago. Sed homoj, kiuj serĉas pli ol ordinaran turisman ekscitiĝon kun certa religia aromo, prefere ne sekvu lian modelon, sed bone preparu sian vojon ne nur fizike, tio estas konsideri prudente la enhavon de la pakaĵo, sed ankaŭ spirite, lingve kaj informe. Ne sufiĉas atendi reveliĝon, lumon, trankvilecon, pacon simple nur de la vojo irata. La efikoj ne aŭtomate rezultas el kilometroj piede paŝitaj. Ĉiu vojo al Santiago estas individua Vojo Ja-

koba kaj povas alporti tiom da „graco”, kiom la individuo sopiras. Neniu povas devigi pilgrimvojon por siaj celoj. Sed la vojo povas multaflanke kontribui al la plenumo de deziroj sincere esperataj.

Kulturstrato

Jam en 1987 la Konsilio de Eŭropo honoris kaj iel transformis la Vojon Jakoban al „Eŭropa kulturstrato”, tiel malfermante kaj rekomendante la itinieron ankaŭ al homoj ne firme katolikaj. Same Unesko en 1993 atribuis al la tuto la statuson de „Monda kulturheredaĵo”. Hodiaŭ abunde libroj, filmoj, informiloj helpas pretigi la propran vojon. La paĝoj en interreto ofte estas valoraj, sed en pleno ne plu travideblaj, ne elĉerpe utiligeblaj. Sed per saĝa preparado la nuntempa pilgrimanto trovos ĉiujn indajn celojn survoje kaj komposte kaj pluse, la lumon ĉe la „Fino de la Mondo” (en la galega lingvo Fisterra), kie la suno forsinkas jen majeste, jen mizere en la senfinan oceanon, levante antaŭ la homo la demandojn pri senfineco kaj transcendo neeviteble, rekte kaj pli evidente ol sur la tuta sankta vojo. Jam tial la *Ruta Xacobe* [ŝakobe] meritas la iradon.

Franz-Georg RÖSSLER



La katedralo de Santiago de Compostela

Solvo de “Kiom da?” (Monato 8-9/2010)

Pli ol dek reagojn mi ricevis por la enigmo “Kiom da?” kun la solvoj 2483 kaj la vorto tendaroj! Po unu premion ni sendos al José Mauro Progiante (Brazilo), Bruno Lehtinen (Finnlando) kaj Dorota Burchardt (Pollando). Gratulojn.

R	I	G	A	R	D	U	K	A	T	O	
A	K	V	U	M	I	L	I	O	N	O	
V	E	R	M	I	Ĉ	E	L	E	K	C	I
I	R	A	K	I	L	O	G	R	A	M	O
D	E	K	L	I	V	O	D	E	V	I	L
P	A	L	I	S	A	R	A	N	E	O	J
M	A	L	D	E	C	I	K	O	N	I	O
A	R	L	E	K	E	N	K	E	T	O	N
K	A	R	T	E	N	D	A	R	O	J	
B	A	R	O	K	S	I	G	E	N	O	N
F	E	R	D	E	K	R	E	T	O	N	
M	A	R	T	I	R	K	E	S	T	O	N
K	A	V	A	L	E	R	I	M	E	D	O

Solvo de la proverba enigmo (Monato 8-9/2010)

Malgraŭ eraroj etaj ni tamen rivevis plej multe da solvoj por nia proverba enigmo. 3 da ĝojos legi libreton, nome: Leo De Cooman (Belgio), Elisabeth Barbay (Francio) kaj Atila Makay (Rumanio). Gratulojn.

Antaŭ ol vi trovos la solvon jenaj atentigoj: ankaŭ la vorto sur 14 horizontale ALTARO estis jam la solvo. 29 vertikale efektive temis pri eŭropa lando kaj la priskriboj sur 54 horizontale aktoru kaj 38 vertikale iu kontinento mankis.

N	E	H	E	L	P	A	S	S	P	E	G	U	L
1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12		
E	D	I	K	T	O			A	L	T	A	R	O
13							14						
D	U	R	A		L	M	P	T		A	L	I	A
15					16	17	18		19				
E	A	T		M	U	E	L	I	L		A	N	L
20				21							22		
F	R		E		S	T	A	R		T		O	M
23			24		25				26		27		
E	D	U	K	O		I	N		M	I	K	S	A
28		29		30		31			32		33		34
N		K	R	E	M			A	A	E	I		L
		35						36					
D	A	R	A	F		I	V		P	L	U	M	B
37	38				39	40		41			42		
A	M		N		A	L	A	H		A		I	E
43				44			45				46		
S	E	B		S	P	E	G	U	L		R	E	L
47	48		49							50			
O	R	U	T		S	I	A	M		R	O	L	U
51		52	53						54				
R	I	F	U	Z	A			I	R	O	B	A	L
55			56					57	58				
O	K	O	N	T	R	A	Ü	D	O	L	O	R	O
					59								



Mendu ĉe via loka libroservo
aŭ rekte de: Flandra Esperanto-Ligo,
Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.
www.retbutiko.net retbutiko@fel.esperanto.be
Prezo ĉe FEL: 24 € + afanko (papera versio),
14,40 € (ePub, Mobi, PDF)

La Origino de Specioj Karlo Darvino

Ne eblas troigi la gravecon de tiu ĉi verko.
La teorio, kiun Darvino prezentis en ĉi tiu libro radikale ŝanĝis
nian komprenon pri la vivo kaj ĝia historio.
Kvankam la vivosciencoj tre multe progresis
ekde ĝia unua eldono, *La Origino de Specioj* restas leginda,
eĉ legenda, por ĉiuj,
kiuj interesiĝas pri la teorio de la evoluo.

anoncetoj

Vizitu Ipernity, la socian retejon, kie Esperanto estas unu el la plej ofte uzataj lingvoj. En ĝi kelkaj miloj da Esperanto-parolantoj kune babilas, montras siajn fotojn, pridiskutas mem faritajn filmojn, kunhavigas sian blogon ... Krozu al www.iper-nity.com/?lg=eo Tie vi trovos ankaŭ plurajn numerojn de MONATO senpage elŝuteblajn.

... **jarfine al IF!** Festu novjare kun ni la plej faman aranĝon por familioj kaj plenkreskuloj! Kun ampleksa prelega programo dumtage, kun tuttaga ekskurso, kun alloga vespera propono, kun silvestra bufedo kaj silvestra balo, kun apartaj programoj por infanoj kaj gejunuloj, kun la fama kaj ŝatata trinkejo "Knajpo". Petu informojn de IF, Platz, Postfach 1148, D-34303 Niedenstein. Tel./Fakso: +49 5624 8007. Interrete: www.internacia-festivalo.de.

"Naturista Vivo", la ilustrita revuo por nudistoj/naturistoj/nudnaĝantoj. Belaj koloraj fotoj. Senpaga provkzemplerio. La revuo aperas 4-foje jare, sur 16 paĝoj. Internacia Naturista Organizo Esperantista. Adreso: Jozsef Nemeth, HU-8531 Ihász, Fő u. 41/5. Rete: jozefo.nemeth@gmail.com.

Esperanto-instruistoj: vizitu www.edukado.net. Ĉio de vi por vi!

Kreu vian propran librokatalogon! Per la Retbutiko www.retbutiko.net vi povas krei librolistojn laŭ via propra deziro! Ĉu libroliston pri nur romanoj, aŭ pri poezio aŭ pri ĵus aperintaj verkoj? Tio eblas en la Retbutiko en momento kiu plaĉas al vi, tage kaj nokte, senpage. Vizitu nin en www.retbutiko.net!

Prezo por anoncetoj (nur teksto, sen fotoj, desegnaĵoj aŭ kadroj): 1 eŭro* por unu linio. Sama anonceto kvinfoje sinsekve: triobla tarifo. Sama anonceto ankaŭ en la reta versio de MONATO: duobla tarifo. Minimuma faktursumo: 12 eŭroj*. Por pli grandaj anoncoj petu la tarifon de la eldonejo aŭ rigardu al http://www.esperanto.be/fel/mon/mon_anon.php.

*Por Eŭropa Unio: + 21 % AVI.

La ondo de esperanto

Ĉiumonata soci-kultura revuo en Esperanto



Abonebla kontraŭ

mare 38 EUR

aere 43 EUR

rete 12 EUR

ĉe UEA, FEL, ELNA, UFE, EAB, SEF kaj dudeko da aliaj landaj perantoj

Fondita en 1909. Refondita en 1991. Eldonata en Rusio

- Tiel ni vivas: raportoj el la postkomunisma mondo
- Tra Esperantujo
- Niaj problemoj: revuoj, eseoj, intervjuoj, polemikaĵoj
- Lingvaj respondoj de Sergio Pokrovskij
- Historio kaj kulturo de Esperanto
- Recenzoj pri la novaĵoj de la libromarkato
- Mozaiko: krucvortoj, konkursoj, kvizoj, humuraĵoj
- Literatura suplemento semajnfine

SOCI-KULTURA REVUO EN ESPERANTO

Senkultura homo estas sklavaj besto (Cicero)

ISSN 0299-6687

LA GAZETO

MONDKULTURA
SENDEPENDA
ESPERANTISMA

Petu provnumeron ĉe: LA GAZETO
12 sous la Ville, 55210 CREUË (Francio)

lagazeto@osiek.org

<http://www.lagazeto.com>

La KancerKliniko

Politika Kultura Skandalema Ajnista
4 numeroj jare + La Krom

ikk@free.fr

Regulaj kunlaborantoj: Serge Sire, Michel Duc Goninaz, Manuel de Seabra, Kris Long, Hu Guozhu, Ionel Onet, Mikaelo Bronŝtejn, Arnau, Laŭrenco Septier, Mao Zifu, Jopetro Danvy, Petro Braŭn, Gennadij Turkov, Fra Gaeta, Roger Siarri, Ŝarlerik d'Arroi, Ĵak Le Puil, ktp.

Abono: 25 € (ekde 14 en kelkaj landoj)
Jacques Le Puil, pĉk 12 729 73 X Paris
aŭ ĉe FEL, UEA, Esperanto-USA, ktp

Kiel Vaglumo

Willem Elsschot



Vaglumo

m Elsschot

Antaŭ 50 jaroj mortis Willem Elsschot, unu el la plej famaj flandraj verkistoj de la pasinta jarcento. Okaze de tiu jubileo, Flandra Esperanto-Ligo eldonis la verkon “Kiel Vaglumo” (Het dwaallicht) en traduko de Bert Boon.

“Kiel Vaglumo” estas aspekte maldika libro 56-paĝa, sed enhave ĝi estas novelo plurtavola ... La tavoloj sin kaŝas, ĝis la leganto atingas iun tavoloŝlosilon, kiun li nur per tre atenta legado malkovros.

Eldonjaro: 2010

Tradicia bindita versio: formato 135 x 205 mm, 56 paĝoj, ISBN: 978-90-77066-45-4;
prezo ĉe FEL: 10,00 EUR + aŭfranko.

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, Antwerpen, Belgio.

Rete: www.retbutiko.net - retbutiko@fel.esperanto.be